

Esperanto

ISSN 0032-4361

12

1992

v. 19, 034 / 1992  
中國報 道


EL POPOLA


ĈINIO



Fiškaptado sur glacio

Foto de ZHU QINGRONG







En aŭtuno

Foto de LI CHUNGENG

## INTER NI

### Proponoj atentataj

Mi sugestas, ke la nomojn de la urboj skribitaj en alia lingvo devas sekvi Esperantaj transskriboj en krampoj, por ke la legantoj povu prononci korekte.

**CHARLOS ALBERTO FERREIRA SILVA** (Brazilo)

*La ĉina registaro dekretis, ke en la publikaĵoj por la alilandaj legantoj oni devas literumi la nomojn de ĉinoj kaj ĉinaj lokoj laŭ la ĉina fonetika alfabeto. Por faciligi la legadon de niaj legantoj, ni metas post la nomoj iliajn Esperantaj transskribojn en krampoj, kiam ili unuafoje aperas en artikolo; sed ili refoje aperas nur en formo de oficiala literumo laŭ la ĉina fonetika alfabeto.*

La Red.

Ofte ĝenas min la du-tri linioj en la komenco de artikolo, kiuj estas, post la nomo de regiono, la detaloj pri provinco, gubernio ktp. Ĉu vi povas meti tiajn detalojn ĉe la malsupro de la paĝo por ne interrompi la fluon de la legado?

**MARJORIE ELLYARD**  
(Aŭstralio)

*Ni laŭeble kontentigos s-ron Ellyard, tamen tiaj detaloj iam neeviteble aperos en la artikolo.*

La Red.

Ni vivas en la konstante ŝanĝanta mondo kaj mi pensas, ke jam venis la tempo, ke en via revuo aperu reklamoj de ĉinaj firmaoj dezirantaj oferti siajn varojn al eksterlandanoj. Se tiaj anoncoj aperos flanke de ĉinaj firmaoj, eble ankaŭ venos similaj anoncoj aŭ reklamoj flanke de alilandaj firmaoj.

**ANDRZEJ PETTYN** (Pollando)

*Ni aperigos en nia gazeto reklamojn pri ĉinaj varoj esperante, ke ankaŭ niaj legantoj liveros al nia gazeto reklamojn de siaj firmaoj.*

La Red.

Via gazeto estas senpolitika, neŭtrala. Bone! Sed multaj aliaj homoj volas politike lerni el Ĉinio. Solvo: aldonu ĉiumonate unu aŭ du faldfoliojn. Kiu volas, povas kromaboni.

**ERNST DIEDRICH**  
(Germanio)

*Nia gazeto raportas ĉefe la aktualan reformadon, tradician kulturon kaj socian vivon de Ĉinio kaj malmulte koncernas politikon. Ni raportas nur gravajn politikajn aktivadojn kaj eventojn, se necese. Pro la malmulteco de niaj kromabonantoj kaj alta kosto de presado, bedau/rinde ni ne povas kontentigi Ernst Diedrich kaj aliajn legantojn.*


La Red.

**ENHAVO**

- 10 **Kiom forta la ĉina sporto?**  
 8 **Akcioj en Ĉinio**  
 30 Denove aperis la "nevidita" urbo  
 37 Pri vojaĝo en la antaŭurbo de Dalian  
 6 Revenigu infanojn en lernejon  
 16 **HISTORIA MISTERO:**  
 Naskiĝo de la ĉirka skribolingvo  
 42 **MEDICINA KONSULTEJO:**  
 Por resanigi anus-malsanulojn  
 15 Arta muzeo kun propraj trajtoj  
 50 **EL ĈINAJ GAZETOJ**  
 44 **LOĜDOMOJ KAJ MOROJ:**  
 Antikva strateto en la prospera urbo  
 27 **SUR STRATOJ:**  
 Antikvaj pekin-stilaj stratetoj sub pagodo  
 51 **LAŬ ANTIKVA VOJO AL TIBETO (XIII):**  
 Sanktejo en la historio de la rilatoj inter tibetanoj kaj hanoj  
 43 La tigrototemo de ji-oj
- 34 Homoj savantaj blindulojn el mallumo  
 41 **AMUZOJ**  
 48 **KURANTAJ AFEROJ**  
 20 **Kongreso de kunlaboro kaj progreso**  
 26 Facetoj de la 5-a Pacifika Kongreso de Esperanto  
 18 Esperantistoj viglaj en montregiono  
 39 Naskiĝo de scienca verkaro en Esperanto  
 40 Antaŭparolo por "Aktoj de Internacia Scienca Akademio Comenius"  
 14 **ESP-NOVAĴOJ**  
 19 **POR KOMENCANTOJ:**  
 Lito el floroj  
 4 **INTER NI**  
 38 **KORESPONDI DEZIRAS SUR LA KOVRILO:**  
 Ĉinaj kaj alilandaj esperantistoj dum la 5-a Pacifika Kongreso de Esperanto
- Foto de HAN HONG
- 2 Fiŝkaptado sur glacio  
 4 En aŭtuno  
 36 Domoj el tritikaj tigoj

**LOKOJ MENCIIATAJ EN ĈI TIU NUMERO**

1. Benxi (p. 30)
2. Dalian (p. 37)
3. Foshan (p. 44)
4. Shiyao (p. 18)
5. Yunnan-provinco (p. 43)



SHI PING:

# Revenigu infanojn en lernejon

— Pri la projekto "Espero"

**E**N Ĉinio estas tricent milionoj da lernoagaj infanoj kaj ducent dudek milionoj el ili nun lernas en lernejoj. Sed en la lastaj dek jaroj, meznombro ĉiujare kvar milionoj da elementlernejoj ĉesis lerni, nome ĉiutage pli ol dekmil infanoj forlasis lernejon, kaj ĉiujare 1.09 milionoj el ili ĉesis lerni pro malriĉeco.

Kvankam jaro post jaro disvolviĝas la fundamenta edukado en Ĉinio, tamen pro postĝinteco de la ekonomio kaj la tro granda loĝantaro, la kreskanta monsumo por edukado ankoraŭ ne povas plenumi la bezonon. Se la meznombra monsumo por edukado por ĉiu lernanto aŭ analfabeto plimultiĝos je dek juanoj, la ŝtato bezonos 4.4 miliardojn da juanoj ĉiujare. Estas granda malfacilo por la registaro rapide pliigi investaĵon por la edukado.

La Centra Komitato de la Ĉina Komunista Junulara Ligo ĉiam zorgis pri tiu problemo. Post aktiva preparado, oni fondis en oktobro de 1989 la Fonduson de Disvolvigo de la Ĉinaj Junuloj kaj Knaboj. La ĉefa tasko de la fonduso estas kvesti en kaj ekster Ĉinio kaj transdoni la monon al la infanoj en landlimaj kaj malriĉaj regionoj, por ke ili daŭrigu sian lernadon. La iniciatintoj de la fonduso nomas la aferon projekto "Espero".

Tio estas facile komprenata, ĉar homa riĉfonto estas la plej valora en la mondo. Por altigi la produktivecon, meznombran enspezon kaj plibonigi la socian bonstatigon de

Instruisto revenigas en lernejon infanojn, kiuj ĉesis lerni.




la disvolvigantaj landoj, kie oni estas malmulte salajrata, investo al la popola klerigado estas la plej grava afero. Edukado estas ponto, kiu helpas la homojn elturniĝi el postginteco kaj malriĉeco kaj akiri ŝancon kaj esperon; dum infanoj kaj junuloj estas la estonteco kaj espero de la nacio. Disvolviĝo kaj progreso de Ĉinio bezonas generaciojn da novaj klerigitaj homoj.

Tuj ĉe la fondiĝo de la fonduso, la projekto "Espero" fariĝis fokuso de la atendo de la publiko. La fonduso ricevas leterojn kaj poŝtsenditan monon.

S-ro Luo Xiong (Lŭo Ŝjong), ĝenerala direktoro de la Konstrumateriala Kompanio Nanfang en Hangzhou, skribis en sia letero: "Rememorante mian avidon al lernado en la infaneco, mi estas kapita de simpatio por tiuj infanoj, kiuj ĉesis lerni nevole. Mi sendas al vi 500 juanojn. Ili estas pago por mia pluslaboro kaj premio." Tiu sumo estas trioblo de monata salajro de ordinara laboristo en Ĉinio.

Knabo Zhou Tong (Ĝou Tong) de la Tianjin (Tjanĝin)-a Eksperimenta Elementa Lernejo skribis en sia letero: "Ĉe la novjara festo mia patro donacis al mi dudek juanojn, kaj mi metis ilin en mian ŝparmonujon por poste aĉeti belan ludilon, kiun mi deziris eĉ en sonĝo. Sed kiam mi televidis, ke multaj infanoj eĉ ne havas necesan skribi-



La nova elementa lernejo Espero de Luotian-gubernio, Hubei-provinco

laron por lernado, mi decidis ne aĉeti la ludilon kaj sendi al vi la monon, por ke vi transdonu al tiuj kamaradetoj..."

Avino en modesta vesto venis al la sidejo de la fonduso kaj donacis koverton kun dekmil juanoj ene. Ŝi diris: "Nia popolo estas tre malriĉa, kaj la iniciato de la projekto 'Espero' emociis min. Mi intencis heredigi la monsumon al miaj kvar filinoj, sed la informo pri la projekto konigis min, ke la infanoj en malriĉaj regionoj pli urĝe bezonas monon." Ŝi foriris anonime.

Entreprenoj de Ĉinio fervore subtenis la projekton "Espero". La Pekina Stone-kompanio de Oficejaj


Ekipaĵoj donacis milionon da juanoj. Tiu sumo estis la plej granda donaco de la kompanio post ĝia fondiĝo. La Pekina Limigita Kompanio de Kentucky faris benefican vendadon kun la slogano "por la infanoj, por la estonteco" kaj donacis al la fonduso 400 milojn da juanoj. La Cigareda Fabriko Yuxi (Juŝji) en Yunnan (Junnan)-provinco donacis 600 milojn da juanoj esprimante "prizorgon al la infanoj ĉesintaj lerni kaj la maltrankvilon pro la malbona stato de la fundamenta edukado".

Fama artisto s-ro Ling Feng de Taiwan-provinco donacis centmil juanojn kaj establis la fonduson "Transmara Amo" por la projekto "Espero" dank' al la subteno de la fonduso, por pli multe kvesti en kaj ekster Ĉinio. En malpli ol unu jaro la fonduso jam kolektis 1.5 milionojn da juanoj, per kiuj oni konstruis kvar elementajn lernejojn.

Japana s-ro Abe Tsutomu donacis cent milionojn da enoj, kaj iu usona raportisto de New York Times donacis dekmil usonajn dolarojn post vizito al montregiono.

En la du jaroj de post oktobro de 1989, kiam Ĉinio ekpraktikis projekton "Espero", la fonduso ricevis 12.32 milionojn da juanoj oferitaj de du milionoj da homoj. Dank' al tiu sumo 40 000 infanoj povis daŭrigi sian lernadon, aperis 17 novaj

En klasĉambro de la elementa lernejo Espero



# Akcioj en Ĉinio

**E**N Ĉinio milionoj da entreprenoj estas sub dispono de la centra kaj lokaj registaroj, tamen en la lastaj jaroj aperis 3 200 entreprenoj akciaj, kiuj ne havas kutiman rilaton kun la registaro. Multaj el ili estis reformitaj de la ŝtataj kaj iuj fondiĝis pere de emisio de akcioj. Inter ili estas limigitaj kompanioj funkciigitaj kune de ĉinaj kaj eksterlandaj investantoj. Nun Ĉinio praktikas akcian sistemon ĉefe en Shenzhen (Ŝenĝen) kaj Ŝanhajo. La tieaj akciaj entreprenoj plejparte estas bonprofitaj. Ili, elastecaj en la produkto kaj ko-

merco, estas vivipovaj.

## ĈION DECIDAS DIREKCIO

De post ekpraktiko de akcia sistemo, la entreprenoj povas fari memdecidon, kio estas la plej granda ŝanĝiĝo. Tio estas ĝenerala opinio de la gvidantoj de la akciaj entreprenoj. Unu el la celoj de praktiko de akcia sistemo estas forigi la superfluan kontrolon far registaroj al la entreprenoj.

La kapitalo de la akciaj kompanioj konsistas el akcioj de la ŝtato, de leĝa persono kaj de individuoj. Ilia gvida organo estas akciulkunveno, sed ne registaro. Ilia decida organo estas direkcio elektita

de la akciulkunveno. La registaro influas la entreprenojn nur pere de la direkcio, en kiu ĝi estas reprezentanto de la ŝtataj akcioj, kaj ĝi ne rajtas senpere direkti la entreprenojn. Tiel la entreprenoj povas mem fari gravajn decidojn konforme al sia bezono.

La Limigita Kompanio Bao'an de Shenzhen estas akcia kompanio, kiu la unua emisiis akciojn. En 1983 ĝi estis simpla investa kompanio, sed post kelkara disvolviĝo ĝi fariĝis sinteza kompanio, kiu faras negocon de terkaj domhavaĵoj, industriajn produktadon kaj komercon. Nun ĉiujn gravajn decidojn faras la akciulk-

elementaj lernejoj kun la nomo espero kaj 500 studentoj kaj mezlernejoj ricevis specialan stipendion.

Malgraŭ tio, la sumo estas tro malgranda en komparo kun la bezono de milionoj da infanoj, kiuj ne povas viziti lernejon pro malriĉeco.

Por ke pli multe da homoj helpu la projekton "Espero", konforme al la deziro kaj bezono de la mondonacantoj, la fonduso komencis en la 15-a de aprilo de 1992 la kampanjon "miliono da koroj por la projekto "Espero". La konkreta enhavo de la kampanjo estas fari rektan kontakton inter la helpantoj (ĉu individuo ĉu kolektivo) kaj helpatoj en malriĉaj regionoj pere de la fonduso kaj ĝiaj branĉoj en diversaj lokoj. La helpo daŭros ĝis kiam la infanoj finos lernadon en elementa lernejo. Tiu ĉi plano puŝis la projekton "Espero" al nova tajdo

kaj rapidigos solvon de la problemo, ke infanoj ĉesos lerni en la malriĉaj regionoj.

La du telefonoj (n-roj: 4033839 kaj 4035547) en la sidejo de la fonduso estas ege okupataj de mateno ĝis profunda nokto. Miloj kaj miloj da leteroj venis al la oficejo. Laboristoj, kadroj, armeanoj, lernantoj, raportistoj, emeritoj kaj fremdlandanoj montris saman deziron, ke ili volantas mondonaci por la infanoj, por la estonteco.

En la du jaroj post establiĝo de la fonduso, formiĝis altefika administra sistemo. Aŭguste de 1991, respondeculo de iu fremdlanda fonduso vizitis la oficejon de la fonduso. Kiam li vidis sur ekrano de komputero detalajn registrojn de pli ol dekmil fojoj da mondonaco kaj dosierojn de dudek mil helpataj infanoj, li diris kun admiro, ke eĉ en lia lando, kie populariĝis komputero, malmultaj fondu-

soj povas atingi tian nivelon en administrado.

La laboro en la oficejo de la fonduso estas tre peza. Ĝi sendas atestilon al ĉiu persono, kiu donacis 20 juanojn, kaj al ĉiu kolektivo, kiu donacis cent juanojn. Krome ili transdonas al la mondonacantoj dankleterojn de helpataj infanoj. Respondo al ĉiu letero estas garantiata. Ĉiumonate la fonduso eldonas broŝurojn de diversaj informoj kaj sendas al la pli ol mil koncernataj unuoj kaj individuoj. Ĉion ĉi tion faras nur dudek laborantoj.

Ĝenerala sekretario de la fonduso s-ro Xu Yongguang (Ŝju Jonggŭang) diris kun plena memfido: "Nia klopodo celas nur, ke ĉiu infano, kiu ĉesis lerni pro malriĉeco, povas daŭrigi lernadon, havi feliĉan infanecon kaj belan estontecon." Tuj ĉe sia fondiĝo la fonduso destinis, ke la laboro de la fonduso finiĝos nur kiam neniuj infano ĉesos lerni pro malriĉeco. ■



kunveno. S-ro Zeng Hanxiong, prezidanto de la direkcio de la kompanio, diris: "Ĉe ni la direkcio decidis ĉiujn gravajn aferojn. En la pasinta jaro la akciuloj trovis, ke Pudong-distrikto de Ŝanhajo havas brilan perspektivon. Nia akciul-kunveno diskutis pri tio kaj decidis elspezi 300 milionojn da juanoj por aĉeti terpecon en Pudong kaj konstrui tie domojn. Se nia entreprenoj ne estus akcia, ni ne povus glate investi tiel grandan monsumon."

Akirinte la memdecidan povon, la entreprenoj multe rapidigis sian reakcion al la ŝanĝigo de la merkataj cirkonstancoj. Ĝuste dank' al tiu avantaĝo, la Limigita Kompanio Jintian (Ĝintjan) de Shenzhen faris plurajn gravajn decidojn en negoco de ter- kaj dom-havaĵoj kaj akiris grandan profiton. Pluraj direktoroj de ŝtataj entreprenoj, kiuj malsukcesis en konkurenco, diris kun envio: "Ja estas bona la akcia sistemo. La akciaj entreprenoj povas mem fari decidon ĝustatempe."

## **MEM RESPONDECI PRI LA PROFITO KAJ DEFICITO**

Prezidanto de la direkcio de la Limigita Kompanio de la Vakuaj Elektronaj Aparatoj de Ŝanhajo, s-ro Xue Wenhai (Ŝjue Ŭenhaj) diris, ke la akcia sistemo vere puŝis la entreprenojn sur la vojon de memrespondeco pri la profito kaj deficino. Antaŭe la registaro administris la entreprenojn ĉefe per kontrolo de provizo de materialoj, energio, salajroj, investo k.a. En tiaj kondiĉoj la entreprenaj respondeculoj ĉiam atribuas la deficion al diversaj kaŭzoj, kaj ankaŭ al la registaro. Kaj la registaro, ĝenerale dirite, malofte severe punas la respondeculojn laŭ kontrakto, tial la memrespondeco pri la profito kaj deficino iam perdis sian signifon.

La akciaj entreprenoj mem estas ekonomia ento. Pro malprofito ofte reduktiĝas la salajro de ĉiuj funkciuloj kaj iuj eĉ estas eksigitaj. La ŝtato, kiel akciulo, havas

nur partan respondecon, sed ne tutan kiel antaŭe.

La akciaj entreprenoj en Shenzhen kaj Ŝanhajo disvolviĝas pli rapide ol ordinaraj ŝtataj entreprenoj. Enketo montras, ke la profitoj de la ŝtataj entreprenoj de Shenzhen en 1990 malpliigis je 28.5% kompare kun tiuj en 1989, dume la ŝtataj havaĵoj de la Disvolvita Banko de Shenzhen, Limigita Kompanio Jintian kaj Limigita Kompanio Wanke kreskis je 275.9% kompare kun tiuj antaŭ ilia praktiko de la akcia sistemo, ĉar en akciaj entreprenoj la proksimvida konduto estas malpermesata. La entreprenoj dediĉas grandan atenton al estontaj interesoj, por ke la akcio pli kaj pli valorigu kaj la akciuloj havu pli multajn kaj pli longdaŭrajn profitojn, kio nature evitigos la trotakson de distribuo kaj neglekto de akumulo.

## **ORDINARAJ AKCIULOJ**

Nun en Ĉinio la akciaj entreprenoj povas esti dividitaj en du partojn, t.e. entreprenoj, kies akcioj cirkulas nur inter la administrantoj kaj laboristoj de la entreprenoj, kaj tiuj, kies akcioj estas publike vendataj en borsoj. En la hodiaŭa Ĉinio la unuaj entreprenoj estas grandnombraj, malgraŭ tio aperis ankaŭ entreprenoj, kiuj publike emisias siajn akciojn en la socio. Pro tio aperis akciaj merkatoj.

La akcia merkato alportis al la ordinaraj popolanoj novan ŝancon por profito kaj vidigis al ili la eblecon ŝanĝi la malnovan sistemon.

Septembre de 1986 en la Borso Jing'an (Ĝing'an), Ŝanhajo, aperis du specoj da akcioj: Feiyue kaj Yanzhong. De tiam oni ekhavis akciojn komerceblajn. En 1989, kiam Shenzhen kaj Ŝanhajo estis difinitaj kiel urboj de provado de akcia komerco, oni rimarkis, ke la interezo de akcioj estas mirige granda kaj oni konkure komercas per ili ne nur en la leĝaj borsoj, sed ankaŭ sur nigra merkato por superprofito. Oni diris, ke en

Shenzhen kaj Ŝanhajo la plej fruaj aĉetintoj de akcioj jam akiris cent milionojn da juanoj da profito kaj iuj gajnis eĉ milionon da juanoj da profito. Tio multe ekscitis la avidon de alilokaj loĝantoj al akcioj. Aperis diversaj kursoj pri akcioj kaj valor-paperoj. La libroj pri akciaj scioj okupis la unuan lokon inter la grandadebitaj libroj en 1992. Oni kun larĝe malfermitaj okuloj observas la akcian merkaton de Shenzhen kaj Ŝanhajo, dezirante, ke la Fortuno iam venos al ili.

## **LONGA VOJO ĜIS LA PERFEKTIĜO**

La publika intereso pri akcioj montras, ke kolekti monon per emisio de akcioj estas unu el la rimedoj por ekonomia disvolviĝo de Ĉinio. La magistrato de Shenzhen deklaris antaŭ nelonge, ke la urbo plirapidigis siajn paŝojn en akci-sistemigo kaj antaŭ la fino de la 20-a jc. en la speciala distrikto estos 1 000 entreprenoj de internaj akcioj kaj 100 entreprenoj, kies akcioj estos publike emisiitaj.

Tamen en Ĉinio la akcia sistemo aperis antaŭ nelonge. Oficisto de la Komisiono pri Reformo de la Ekonomia Sistemo de Ĉinio diris, ke multaj akciaj entreprenoj ne estas normigitaj. Kelkaj el ili estas distorditaj kaj malboninflua. Kvankam la registaro publikigis serion da provizoraj rimedoj pri la akciaj entreprenoj, tamen estas ja longa vojo ĝis naskiĝo de la veraj normoj. En Ŝanhajo estis homo, kiu sin mortigis pro malprofito en akcia negoco kaj en Shenzhen iu entreprenoj estis punita je ĉesigo de la komercado pro serioza malobservo de la leĝoj.


Ekonomikistoj proponis, ke Ĉinio ne devas akci-sistemigi ĉiujn entreprenojn samtempe. Por ke la akcia sistemo iru sur la normigitan vojon Ĉinio devas bone fari taksadon de la kapitalo, distribuadon de internaj akcioj kaj emisiadon de akcioj sur merkato.

■

# Kiom forta la ĉina sporto?

Teksto de ZHANG QINGZHEN

Zhuang Xiaoyan (malsupre), ĉampionino de ĵudo






Chen Yueling, câmpionino de marșo



Wang Yifu, câmpiono de pafado per pneŭmatika pistolo

Lu Li, gajninto de la ora medalo en ŝtupa paralelado



**J**AM finiĝis la 25-aj Olimpiaj Ludoj en Barcelono kun partopreno de 172 delegacioj el 180 landoj kaj regionoj. En la senprecedence grandioza sportkunveno brilaj ludoj de diverslandaj sportistoj gravuriĝis en la memoron de la spektantoj, kaj iliaj atingoj skizis la dispozicion de la sportaj fortoj en la nuna mondo.


En la 16 tagoj la ĉinaj sportistoj kuraĝe luktis kaj bone disvolvis sian spiriton kaj nivelon. Ili gajnis 16 orajn, 22 arĝentajn kaj 16 kuprajn medalojn. Laŭ la nombro de la gajnitaj oraj medaloj kaj la totala nombro de la gajnitaj medaloj Ĉinio leviĝis de la 11-a loko en la 24-aj Olimpiaj Ludoj al la 4-a. Tio sendube spegulis la nunajn fortojn de la ĉina sporto.

Estis la tria fojo por Ĉinio partopreni Olimpiajn Ludojn, post kiam ĝi reokupis la lokon en la Internacia Olimpika Komitato en 1979. En 1984 la ĉina sportista delegacio unuafoje partoprenis en la 23-aj Olimpiaj Ludoj en Los-Anĝeleso, gajnis 15 orajn medalojn kaj per tio okupis la kvaran lokon. Sed en la 24-aj Olimpiaj Ludoj en Seulo en 1988 la ĉinaj sportistoj ne bone disvolvis sian nivelon pro diversaj kaŭzoj kaj gajnis nur 5 orajn medalojn. Ĉi-foje la nombro de la gajnitaj oraj medaloj atingis 16. Fakuloj opiniis, ke tio ne signifas impeton de la fortoj de la ĉina sporto, sed rezultis el scienca peniga trejnado kaj serioza preparo en tekniko, taktiko kaj psikologio, kaj ankaŭ el tio, ke la ĉinaj sportistoj elĉerpis instruon el la antaŭaj Olimpiaj Ludoj. Fine ili akiris sukceson per siaj fortoj.

Tiu kono baziĝis sur atingoj akiritaj de la ĉinaj sportistoj en ordinara internaciaj konkursoj. En la mondaj unuopaj ĉampionecaj konkursoj en 1990-1991 la nombro de oraj medaloj kaj la totala nombro de medaloj gajnitaj de Ĉinio ĉiufoje viciĝis post la tri potencoj. En 1991 la ĉinaj sportistoj gajnis 20 ĉampionecojn en mondskalaj konkursoj de sportbranĉoj listigitaj kiel oficialaj sportbranĉoj de la Olimpiaj Ludoj en Barcelono. Kvankam tiu cifero ne reprezentis la sukceson gajnitajn en la Olimpiaj Ludoj, tamen ĝi povis esti rigardata kiel aproksimanto.

Oni povas diri, ke la sukceso de la ĉina sporto rezultis el longatempa penado. Ĉi tie ni retrospektive rigardu la vojon iritan de Ĉinio en la lastaj jaroj por disvolvi la sporton.

En la Olimpiaj Ludoj en Los-Anĝeleso la ĉinaj sportistoj rompis la "rekordon de nulo" en gajno de ora medalo en Olimpiaj Ludoj, kio markis, ke la ĉina sporto ekiris al la mondo. Kuraĝigate de la sukceso de la Olimpiaj Ludoj en Los-Anĝeleso, Ĉinio difinis sian celon fari sin sporta potenco antaŭ la fino de la kuranta jarcento, kaj prezentis sian olimpikan strategion por disvolvi sporton kun partopreno en Olimpiaj Ludoj kiel sia maksimuma celo. La ĉefa enhavo de la strategio konsistas el mallongigo de batallinio, elstarigo de gravaj punktoj kaj racia dispozicio, t.e., difini kiel la ĉefajn sportbranĉojn piedpilkon, korbopilkon, flugpilkon, tablotenison, volanon, atleti-




Lü Lin (maldekstre) kaj Wang Tao, ĉampionoj de duopa tablotenis ludo

kon, naĝon, plonĝon, gimnastikon, halterlevon, pafon, skermadon, lukton, ĵudon, jakton, mallongdistancan rapidasketadon k.a.

La strategia celo plialtigis la aktivecon de la sportaj gvidorganoj de la provincoj, aŭtonomaj regionoj kaj municipoj, kaj kuraĝigis la vastajn sportistaron, trejnistaron kaj sportan laborantaron al la batalo por ĝin efektivigi. La provincoj Guangdong kaj Liaoning kaj la urbo Ŝanhajo kun relative bona bazo daŭre regas ĉiuflanke en sporto. Konforme al siaj kondiĉoj, la provincoj Sichuan kaj Jiangsu, kun naĝo, plonĝo, gimnastiko, atletiko, jakto kaj pafado kiel gravaj sportbranĉoj, pli aŭ malpli antaŭeniris kaj sendis al la ŝtataj teamoj nombron da elstaraj sportistoj.

La olimpika strategio akcelis la reformon kaj por-domalfermon de la ĉina sporto en pli vasta kampo. Kiel membro de la familio de la internaciaj olimpikoj, ĉiujare Ĉinio sendis milojn da sportistoj kaj trejnistoj partopreni en mondaj kaj aziaj sportaj konkursoj kaj ili gajnis bonan sukceson. La ĉinaj sportistaj rondoj, rompinte izolitan situacion, sendis siajn sportistojn eksterlanden kaj invitis al si alilandajn sportistojn. Ili turnis sian atenton al lernado de alilandaj avangardaj sportoj. Inter la trejnistoj de la Ĉina Sportista Delegacio partopreninta en la ĉi-jaraj Olimpiaj Ludoj estis kuba boksa trejnisto kaj bulgara gimnastika trejnistino. De la 80-aj jaroj Ĉinio jam multfoje engaĝis alilandajn trejnistojn pri piedpilko,




Zhuang Yong, ĉampionino de virina 100-metra libera naĝo

naĝo, atletiko, lukto k.a.

Scienca trejnado kaj penema luktado de la sportistoj estas grava faktoro de la sukceso de Ĉinio en Barcelono. Por partopreni en la Olimpiaj Ludoj de Barcelono 1 500 sportistoj komencis rigoran trejniĝon nelonge post la finiĝo de la 11-a Azia Sportkunveno okazinta en Pekino en 1990. Post unujara trejnado kaj elektado la nombro de trejnatoj reduktiĝis al 800, kaj fine 250 sportistoj estis elektitaj kaj partoprenis en la Olimpiaj Ludoj de Barcelono.

En Ĉinio cirkulas popoldiro: "Kiu intencas venki aliajn, tiu devas unue venki sin mem." En la ĉi-fojaj Olimpiaj Ludoj la ĉinaj sportistoj montris memfidon kaj altan spiriton. Ĉar ili bone konis siajn fortojn kaj ne celis nur gajni oran medalon en la Olimpiaj Ludoj, sed strebis por pleje disvolvi sian nivelon, kaj tio estigis atmosferon por krei bonan sukceson. Multaj sportistoj gajnintaj medalojn montris "supernivelan kapablon" en la luktoj kontraŭ fortaj rivaloj. Estis same ankaŭ por tiuj, kiuj ne gajnis medalojn. Ekz. Zhong Huandi okupis la kvaran lokon en la konkurso de la 10 000-metra vetkuro, tamen ŝi rompis la azian rekordon kaj levis sian rezulton je dekkelkaj sekundoj. Krome, ankaŭ estis ekster nia atendo la jeno: Ĉina sportistino Zhang Shan per 223 pafoj gajnis la ĉampionecon en la dudirekta cirklo-pafado, kiun monopoligis viroj antaŭe, kaj tiel ŝi fariĝis la unika ĉampionino de la mikspafado, kiu estos nuligita en la venontaj Olimpiaj Ludoj. Novicoj Lu Li kaj Li Xiaoshuang unuafoje partoprenis en la Olimpiaj Ludoj kaj gajnis orajn medalojn en la konkursoj de ŝtupaj paraleloj kaj libera gimnastiko respektive. Aparte ĝojindas, ke la Ĉina Virina Korbopilka Teamo venkis la Kuban Teamon en la duonfinalo kaj okupis la duan lokon, unuafoje en la historio de tiu



Fu Mingxia, ĉampionino de virina turplonĝo

sportobranĉo.

La ĉinaj sportistoj, trejnistoj kaj sportaj oficistoj estis laŭdataj pro sia modesteco kaj aplombeco en la Olimpiaj Ludoj. Estro de la ĉina delegacio s-ro Wu Shaozu faris paroladon ĉe la finiĝo de la konkursoj. Li diris: "La ĉinaj sportistoj gajnis 16 orajn medalojn en la Olimpiaj Ludoj, oni povas diri, ke ili montris 'supernivelan kapablon'. Tio signifas nur, ke ili montris sian nivelon iom pli bone ol aliaj, ĉar en iuj sportobranĉoj Ĉinio ne estas multe pli fortaj ol aliaj landoj."

Li aldonis: "Ĉinaj sportistoj gajnis orajn medalojn en nur 7 sportobranĉoj, t.e. kvarono de la 25 olimpikaj sportobranĉoj. Ili gajnis medalojn en nur 14 sportobranĉoj. Krom la rezulto de la Ĉina Virina Korbopilka Teamo, tiuj de aliaj teamoj ne estis dezirataj, sekve la kvalito de medaloj de la ĉina delegacio devas esti plialtigita kaj oni devas klopodi por gajni medalojn aŭ orajn medalojn en pli multaj sportobranĉoj."

Vere, estas rimarkinda distanco inter la ĉinaj kaj alilandaj sportistoj en nemalmultaj sportobranĉoj, precipe en bokso, atletiko, lukto, rajdarto, piedpilko kaj korbopilko. Ankaŭ la rezultoj de iuj fortaj sportobranĉoj de Ĉinio ne estis dezirataj en ĉi Olimpiaj Ludoj. Neniu el la kvar oraj medaloj de volano, unuafoje listigita kiel sportobranĉo de la Olimpiaj Ludoj, estis gajnita de Ĉinio, kaj la Ĉina Virina Flugpilka Teamo, kiu gajnis 5-foje mondan ĉampionecon, malvenkis en ĉiuj 3 grupaj konkursoj.

La Ĉina Sportista Delegacio ne kontentis je sia sukceso, sed male, ili serioze konsideris pri siaj mankoj, kio spegulis la maturiĝon de la ĉina sportistaro.

## ESP-NOVAĴOJ

● La 26-an de julio 1992 la Lanzhou-a Esperanto-Asocio de Gansu-provinco okazigis memoran kunvenon por festi la 10-an datrevenon de sia fondiĝo. En la kunveno eksponiĝis materialoj pri la sukcesoj de E-movado de la asocio en la pasintaj 10 jaroj kaj Esperantaj libroj kaj bildoj.

Tiutage la asocio okazigis ankaŭ sian 4-an kongreson kaj la kongresanoj elektis ĝian novan estraron.

● La ĉinlingva traduko de la libro "Nesenditaj leteroj el Japanio" verkita de Spomenka Štimec, estrarano de UEA pri kulturo, post ŝia vizito al Japanio estas eldonita de la Eldonejo de la Harbin-a Politekniko. La tradukinto estas Geng Tiezhen (Geng Tjeĝen) de la Harbin-a Esperanto-Asocio.

● Lastatempe la Komisiono pri Profesiaj Rangoj de la Guangxi-a Ĝuang-nacia Aŭtonoma Regiono faris decidon, ke en la tuta regiono, krom la angla, japana kaj rusa lingvoj, ankaŭ Esperanto povas esti uzata por ekzameni tiujn, kiuj volas ricevi rilatajn profesiajn rangojn.

● La 5-an de julio 1992 en la Handan-a Normala Kolegio kolektiĝis ĉirkaŭ 50 esperantistoj el

diversaj distriktoj kaj gubernioj de la urbo Handan de Hebei-provinco por festi la 1-an datrevenon de la fondiĝo de la Handan-a Esperanto-Asocio. La 7-an de julio la asocio kune kun la Poŝtmarka Kompanio de Handan emisiis poŝtstampon kaj memoran koverton en la ĉina lingvo kaj Esperanto.

En la Unua Elementa Lernejo de la Fengfeng-a Mineja Kvartalo, la Handan-a Esperanto-Asocio inaŭguris infanan E-kurson, kiun partoprenis 31 kvaraklasaj lernantoj.

● La 25-an de julio, la 18-an kaj 25-an de aŭgusto, la Poŝta kaj Telekomunika Ministerio de la Ĉina Popola Respubliko emisiis poŝtmarkoseriojn "La 25-aj Olimpiaj Ludoj", "La Internacia Spaca Jaro" kaj "La ĉina klasika literatura verko «La Tri Regno» (la 3-a serio)". Koncerne la poŝtmarkoseriojn, la Haikou-a Poŝtmarka Kompanio de Hainan-provinco emisiis Esperantajn poŝtstamponojn, kies projektinto estas Zhang Linrui.

● Dum la 26-a ILEI-konferenco en Bratislavo, Slovakio, okazis Cseh-seminario grado "C" inkluzive diplomigan ekzamenon. La seminarion kaj ekzamenon gvidis s-ino Katlin SMIDELIUSZ el Hungario. Parto-

prenis ĝin 5 personoj el 3 landoj, ĉiuj sukcesis. Se organizantoj de E-kursoj bezonos bonan instruiston, ili turnu sin al adreso de Internacia Esperanto Instituto en Hago, Nederlando. La listo enhavas 23 adresojn el 4 kontinentoj.

● La Unua Mondkongreso de Esperantistoj Handikapuloj oficiale okazis en la 18-a ĝis la 25-a de julio 1992 en malgranda banloka urbeto Františkovy Lázně en Ĉeĥoslovakio. Partoprenis ĝin 74 e-istoj el Kanado, Francio, Nederlando, Germanio, Pollando, Hungario, Rusio kaj Ĉeĥoslovakio. Oni decidis fondi la vere Internacian Klubon de Esperantistoj Handikapuloj. Interesuloj petu aliĝilon ĉe Asocio de E-istoj Handikapuloj, P.K. 63, CS 274 01 SLANY, Ĉeĥoslovakio.


● Kadre de la Somera Universitato de Jyväskylä (havanta sian 80-an laborjaron), la Esperanto-klubo de Jyväskylä aranĝis sian 25-an Someran Studsemajnon de la lingvo Esperanto de la 28-a de junio ĝis la 3-a de julio 1992. La jubilea studsemajno estis granda sukceso: ĝin partoprenis 37 lernantoj el 7 landoj. Oni havis kursojn por komencantoj kaj progresintoj. Informpetojn pri venonta jaro sendu al s-ino Seija Kettunen, Keihäsmiehenkatu 3, SF-40630 JYVÄSKYLÄ, FINNLANDO.

Belgaj esperantistoj en la redakcio de EPĈ



En la studsemajno aranĝita de la Esperanto-klubo de Jyväskylä





La Arta Muzeo Yan-Huang

**N**AJBARE de la Vilaĝo por Azia Sportkunveno de Pekino estas eleganta konstruaĵo kun tegmento en tradicia griza koloro de Ĉinio. Ĝi malharmonie staras, kiel fremdulo, inter modernaj domegoj. Ĝi estas la Arta Muzeo Yan-Huang, unua tia muzeo de Ĉinio, konstruita per mono kolektita de polanoj.

Antaŭ tio, ĉiuj grandaj kulturaj konstruaĵoj de Ĉinio estis investitaj de la ĉina registaro. Sed ne sufiĉis nur la financo de la registaro por la kulturaj aferoj, tiel ke dum longa tempo oni prokrastis konstrui kulturajn ekipaĵojn multe investitajn kaj ne-profitajn. En tia situacio, la moderna arta muzeo kun ĉina klasika stilo estis konstruita, dank' al la helpo de en- kaj eksterlandaj mecenatoj.

Ĝenerale, la artistoj havas pli fortan inklinon al tradicio ol la ordinaruloj. Kiam aliaj arde strebas por vivi modernan vivon, ili atentigas, ke sen historio ja ne estas moderna estonteco. Por ke ĉiuj memoru la historion, kulturon kaj arton de kelkmil jaroj de la ĉina nacio, oni donis al la muzeo la nomon Arta Muzeo Yan-Huang. Mito diras, ke en la pratempo sen skriba historio, en la baseno de la Flava Rivero vivis du potencaj triboj, kies ĉefoj nomiĝis Suvereno Yan kaj Suvereno Huang. Poste okazis milito inter la du triboj. Venkinte la alian, Suvereno Huang unuigis ambaŭ tribojn. Jen la pratropo de la ĉina nacio.

Menciante la konstruadon de la arta muzeo, oni ne povas ne rememori faman ĉinan pentriston s-ro Huang Zhou, unu el la iniciatintoj pri la konstruado de la muzeo. S-ro Huang, memfarita pentristo, naskiĝis en la kamparo de Hebei-provinco, Ĉinio. Profunde influite de la ĉina tradicia arto en la infanaĝo kaj dank' al la longtempa vivo en Xinjiang kaj aliaj nacimalplimultaj regionoj, li lerte pentras ujugurajn knabinojn kaj ĝenrojn de nordokcidenta Ĉinio, kaj liaj pentraĵoj famas en- kaj eksterlande. En 1986, liaj pentraĵoj estis eksponataj en Singapuro kaj faris sensacion. Li esperis, ke oni konstruos en Pekino tradician ĉinan artan muzeon, rivalantan

CAO WEI:

## Arta muzeo kun propraj trajtoj

— Pri la Arta Muzeo Yan-Huang

kun modernaj muzeoj de evoluintaj landoj, por disradii la ĉinan civilizacion. Por tiu celo, antaŭ ĉio, li oferis ĉiujn historiajn objektojn, antikvajn kaligrafiaĵojn kaj pentraĵojn, kiujn li posedis, kaj ankaŭ siajn ĉ. mil elstarajn verkojn.

Lia faro esprimis ĝuste la deziron de multaj en- kaj eksterlandaj ĉinoj kaj vekis grandan eĥon ĉe ili. Famaj ĉinaj pentristoj Chang Shuhong, Dong Shouping kaj Bai Xueshi oferis siajn pentraĵojn; d-ro Li Zhengdao, usonano de ĉina deveno kaj gajninto de Nobel-premio, propagandis pri la konstruado de la muzeo en Usono; kaj elmigrintaj ĉinoj en Nederlando, Koreio, Hongkong kaj aliaj landoj kaj regionoj unuj post aliaj sendis monon tiucele. Dank' al la monhelpo, finkonstruiĝis aŭtune de 1991 la moderna arta muzeo kun areo de pli ol 3 000 kvadrataj metroj kaj investita je 40 milionoj da juanoj.

Ĝi estas muzeo kun tradiciaj trajtoj kaj moderna stilo. Ĝia giganta tegmento kun pluraj klinoj imagigis imponajn leviĝantajn tegmentrandojn de la palacoj de Tang- kaj Song-dinastioj (618-1279), kaj ĝiaj terasoj kaj verandoj kun distingiĝaj eĝoj kaj anguloj iom similas al tiuj de modernaj konstruaĵoj. Ĝi havas sur la fasado du kuprajn pordoklapojn, donacitajn de Taiwan-aj artistoj. Enirinte la ekspoziciejon, oni povas ĝui pentraĵojn de 8 famaj

En la muzeo



# Naskiĝo de la ĉina skribolingvo

de SHI PING

**L**A ĉina skribolingvo estas unu el la plej malnovaj skribolingvoj nun uzataj en la mondo. Kiam kaj kiel naskiĝis la ĉina skribolingvo? La demando ĉiam vekas grandan intereson de la mondo.

## TRADICIAJ OPINIOJ PRI LA ORIGINO DE LA ĈINA SKRIBOLINGVO

Laŭ la plej malnova diro, la kreinto de la ĉina skribolingvo estis Cang Jie (Cang Gje). Tiu diro jam estis tre populara en la periodo de la Militantaj Regnoj (403-221 a.K.). Sendube la ĉina skribolingvo ne estis kreita de sola persono. Sed kredeble dum la evoluado de la ĉina skribolingvo, precipe en la lasta periodo de ĝia evoluado, iuj individuoj ludis gravegan rolon, kaj Cang Jie estis unu el ili. Iuj kredis, ke Cang Jie estis analisto de tribestro Huang Di en la prahistorio de Ĉinio, aliaj opiniis, ke li estis tribestro pli frua ol Huang Di, kaj triaj diris, ke li estis nur kultura heroo fikciita de prauloj.

Estis ankaŭ tia diro, ke la ĉina skribolingvo devenis de la ok diagramoj de "Ji Ĝing". Oni opiniis, ke antaŭ la naskiĝo de skribolingvo ŝnurnodiĝo kaj ok diagramoj ludis rolon de skribolingvo. Iuj eruditoj de Song-dinastio (906-1279) asertis, ke la ideogramoj "ĉielo" kaj "tero" devenis de la koncernaj diagramoj, sed tiu aserto estis tro altruda.


## KONCERNAJ ARKEOLOGIAJ MATERIALOJ

Post la leviĝo de la moderna arkeologio en Ĉinio oni trovis en la pasinta duonjarcento materialojn koncernantajn la originon de la ĉina skribolingvo.

La unua kategorio da materialoj estis hieroglifoj de la primitiva socio. Plejparto de

la hieroglifoj estis gravuritaj aŭ pentritaj sur fajencaĵoj, kaj la aliaj estis gravuritaj sur skapoloj aŭ testudaj ŝeloj. La plej fruaj hieroglifoj estis trovitaj ĉe la unuaperioda kultura ruino Dadiwan de Gansu-provinco kaj la ruino Jiahu (Ĝjahu) de Henan-provinco antaŭ 7 000-8 000 jaroj. Kaj la hieroglifoj sur la fajencaĵoj trovitaj ĉe la ruino Banpo de la fruaperioda Yangshao-kulturo antaŭ 6 000-7 000 jaroj estas pli multaj kaj interesantaj la fakulojn. (Vidu la bildoserion 1.)

Ĉe la ruino de Jiangzhai (Ĝjangĝaj) de Lintong de



Yangzhou-aj pentristoj de Qing-dinastio (1616-1911). En la halo estas malhele, sed en la vitraj montrofenestroj sendiĝas hela kaj milda lumo, tio povas ne nur speguli la antikvecon de artaĵoj, sed ankaŭ plene montri la subtilajn ŝanĝiĝojn de verkoj.

La muzeo havas nun 90 laborantojn, kiuj ne ricevas salajron de la ŝtato, nek ĝuas la bonstatigan helpon de la ŝtato, sed estas salajrataj de la muzeo

mem. Ilia enspezo estas malpli alta ol tiu en aliaj unitoj, tamen kiel laborantino f-ino Li diris al mi: "Ĉiu havas sian propran volon. Mi studis historion kaj mi ŝatas tiun laboron. Koncerne al aliaj, iuj forlasis la muzeon kaj iuj restas ĉi tie. Eble la lastaj havas preskaŭ saman ideon, kiel mi."

En la muzeo la vizitantoj ne nur ĝuas altnivelan arton, sed ankaŭ sentas la sincerecon de la kontribuintoj al la ĉina kulturo per la tieaj pentraĵoj, luksaj lampoj kaj plankoj el polurita marmoro. ■



Shaanxi(Ŝenŝji)-provinco oni trovis pli komplikajn signojn. (Vidu la bildoserion 2.)

Fakuloj elmetis multajn konjektojn, kaj iuj opiniis, ke malgranda parto de la signoj (ĉefe la signoj por nombroj) estis asimilitaj de la ĉina skribolingvo, kaj la ceteraj ne havis rektajn interrilatojn kun la formiĝo de la ĉina skribolingvo.

La dua kategorio konsistas el geometriaj figuroj sur grandaperaturaj fajencaj ujoj trovitaj ĉe la ruino de la posta periodo de Dawenkou-kulturo de Shandong-provinco (2800-2500 a.K.). (Vidu la bildoserion 3.)

Parto de la fakuloj rigardis ilin kiel rudimentan skribolingvon, dum la aliaj ne. Kvankam oni ne povas preni ilin kiel la primitivan skribolingvon, tamen oni povas rigardi ilin kiel rudimenton de la primitiva skribolingvo, ĉar parto el ili aperis plurfoje sur objektoj trovitaj en diversaj lokoj.







Ĉe la kulturaj ruinoj de la dinastioj Xia (Ŝja) (21-16 jc. a.K.) kaj Shang (16-14 jc. a.K.) troviĝas malmulte da materialoj de skribaĵoj, kaj ili ne povas speguli la nivelon de la evoluado de la ĉina skribolingvo. Inter la klare karakterizitaj kaj enhavoriĉaj materialoj pri la antikva ĉina skribolingvo la plej fruaj estas ideogramoj sur skapoloj kaj testudaj ŝeloj trovitaj ĉe la ruino de la posta periodo de Shang-dinastio (14-11-a jc. a.K.). Ili estas la skribolingvo, kiu povas detale noti la parolan lingvon. Ĉi-sube estas la unuaj konjektoj pri la formiĝo de la ĉina skribolingvo.



## FORMIĜO DE LA ĈINA SKRIBOLINGVO

Antaŭ la naskiĝo de la skribolingvo oni notis per objektoj, bildoj kaj diversaj signoj, kaj la maniero estis analoga al la principoj por kreado de ideogramoj.

En la periodo de la primitiva skribolingvo la hieroglifoj kaj bildoj estis samtempe uzataj. La ĝe-

nerala opinio estas, ke la plej frua skribolingvo devas esti hieroglifoj, ekzemple la bildoj pri ĉasado de cervo en kaverno en la primitiva socio montras la figurojn de homo kaj cervo kaj la agon de pafo. Oni ne povas facile distingi, kio estas bildo kaj kio estas hieroglifo. (Vidu la bildoserion 4.)

La skribolingvo, kiu plej bezonis ideogramojn, estis numeraloj kaj adjektivoj malfacile esprimeblaj per figuroj. En la primitiva skribolingvo oni jam uzis abstraktajn geometriajn figurojn kaj simbolon. Ekzemple en la antikva ĉina skribolingvo oni determinis la vortojn "kubo" kaj "rondo" per  kaj , esprimis la numeralojn 1, 2, 3, 4 per primitivaj strekoj    kaj esprimis "granda" per la figuro  simbolanta maturan viron. Tiaj ideogramoj en la ĉina skribolingvo, kiuj havas signifon, sed ne havas rilaton de prononco, estas nomataj signifaj ideogramoj, kaj la metodo por krei ilin ne taŭgas por plejparto de la ideogramoj.

Antaŭ la naskiĝo de la ĉina skribolingvo oni uzis signojn, kiuj ne havis internan rilaton kun la determinitaj objektoj. Dum la formiĝo de la ĉina skribolingvo malmulte da signoj estis asimilitaj, ekzemple la rudimentaj formoj de la signoj   en la antikva ĉina skribolingvo signifantaj 5, 6, 7 kaj 8 estis primitivaj signoj. Sed la formoj de la signoj ne havas internan rilaton kun la determinitaj vortoj, krome ili ne estis facile rekoneblaj kaj akcepteblaj.

Por venki la malfacilojn kaŭzitaĵojn de la limigiteco de la ideografio kaj signoj, oni havas nur unu solvon, nome alpreni la sonprononcan metodon — noti vorton aŭ objekton samprononcan aŭ simile prononcan al la pruntita ideogramo aŭ signo. Tia metodo estis nomata "prunto", kaj la ideogramoj faritaj per tiu metodo estas pruntitaj ideogramoj. La signoj en la pruntitaj ideogramoj devas esti nomataj homofonoj, malsamaj kiel la literoj.

La ideogramoj kaj pruntitaj ideogramoj evidente diferencaj de bildoj estas konkreta marko de la komenciĝo de la formiĝo de la ĉina skribolingvo.

Sed plimultiĝo de pruntitaj ideogramoj estigis novan problemon: la ideogramoj signitaj per pruntitaj ideogramoj facile konfuziĝis kun la pruntitaj ideogramoj. Sekve oni aldonis al la pruntitaj ideogramoj la ideogramojn kaj signifajn signojn. Tiaj ideogramoj estas sonprononcaj, kies sonprononca parto estas nomata sonprononca flanko kaj kies signifaj flanko — figura flanko. La apliko de sonprononcaj ideogramoj multe altigis la klarecon de la esprimo de la ĉina skribolingvo. Tio estis grava paŝo dum la formiĝo de la ĉina skribolingvo.

## LA DATO DE FORMIĜO DE LA ĈINA SKRIBOLINGVO

Pro manko de elokventaj arkeologiaj materialoj oni ne povas certigi pri la dato de la formiĝo de la ĉina skribolingvo. Oni povas nur konjekti la daton de la formiĝo de ĝia kompleta sistemo laŭ la nivelo de ĝia disvolviĝo en la posta periodo de Shang-dinastio (nome skribaĵoj sur skapoloj kaj testudaj ŝeloj).

La skribolingvo en tiu periodo povis perfekte noti la parolan lingvon. Tio markas, ke jam pasis nemallonga tempo de kiam la ĉina skribolingvo disiĝis de la primitivaj hieroglifoj kaj fariĝis perfekta skribolingva sistemo. Samtempe oni povis trovi inter ili primitivajn spurojn, el kio vidiĝas, ke ne estis longa tempo inter la posta periodo de Shang-dinastio kaj la formiĝo de la perfekta skribolingva sistemo. La antikva ĉina literaturo "Ŝang Ŝu" diras, ke aperis perfektaj notoj dum la transiro de Xia-dinastio al Shang-dinastio, kaj laŭ tio oni povas aserti, ke la formiĝo de la perfekta sistemo de la ĉina skribolingvo datiĝis eble en tiu transiro, nome en la 17-a jarcento a.K. ■

# Esperantistoj viglaj en montregiono

**A**NTAŬ nelonge esperantistoj en la Aŭto-industria Korporacio Aeolus de Ĉinio faris sensacian aferon. Dank' al plena subteno kaj organizado de "El Popola Ĉinio" ili venigis delegacion de 15 raportistoj el 13 radioj kaj redakcioj en Pekino al la korporacio por fari intervjuon. La delegacio estas la unua granda raportista delegacio veninta al la korporacio. Ĝi ludas sendube gravan rolon por plivastigi la famon de la korporacio kaj akceli la kunlaboron inter la korporacio kaj aliaj fabrikoj en kaj ekster Ĉinio. Tagĵurnalo de la korporacio raportis tion kaj akcentis la pontan rolon de Esperanto. Oni alte taksis la junulojn.

La Aŭto-industria Korporacio Aeolus estas la plej granda aŭtofabriko de Ĉinio kaj famiĝis en kaj ekster Ĉinio pro sia kamiono kun marko Aeolus (marko Dongfeng enlande). Nun la korporacio havas pli ol 80 000 laboristojn kaj oficistojn kaj produktas pli ol 150 000 kamionojn jare. Tiuj kamionoj ne nur kontentigas la enlandan merkaton, sed ankaŭ eksportigas al dekelkaj landoj de Afriko kaj sudorienta Azio.

Inter la laborantoj de la korporacio akceptantaj ĵurnalistojn troviĝis junaj esperantistoj Xu Ping (Ŝju Ping) kaj Wang Junmin (Ŭang Ĝjunmin). Ili akompanis la raportistojn en la vizito al la filioj. Tro da laboroj lacigis ilin, tamen ne povis kaŝi ilian ĝojon, ĉar ili refoje kontribuis al sia korporacio pere de Esperanto.

Xu Ping estas mia malnova amiko, kun kiu mi konatiĝis antaŭ kelkaj jaroj. Tiam li ĵus debutis en Esperantujo kaj ekiris la malfacilan vojon de memlernado kun aspiro al la nobla idealo de la internacia lingvo. La Aŭto-industria Korporacio Aeolus sin trovas en izolita montregiono. Tie ne estas veterana esperantisto. Por altigi sian lingvan nivelon, li ofte veturis centojn da kilometroj al veteranaj esperantistoj en la urbo Wuhan. Lia diligenta lernado kurtuŝis la estrojn de la korporacio. Li ricevis permeson lerni Esperanton en Yunnan-universitato por unu jaro. La lernado donis al li kvazaŭ du flugilojn. Li des pli entuziasme sin ĵetis en aktivadojn por Esperanto.

Wang Junmin estas provveturigisto de la korporacio. Ĉiuj novtipaj aŭtoj, antaŭ pogranda produktado kaj livero al la merkato, devas esti provveturigataj de Wang kaj liaj kolegoj sur diversaj kampoj, en diversaj kondiĉoj kaj laŭ diversaj normoj. La laboro postulas kuraĝon, sinoferemon kaj sagacon. Wang Junmin sin anoncis al la Xinhua(Ŝinhŭa)-a Korresponda Esperanto-Lernejo en 1980 kaj ricevis lernomaterialojn, inter kiuj troviĝis diskoj kaj kasedoj kun mia voĉo. Tamen ni neniam intervidiĝis. Ĉi-foje, renkontiĝinte en la korporacio, ni sentis nin tre intimaj. Por bone fari sian provveturigadon, li ĉie sorbis sciojn. Li lernis la anglan kaj francan lingvojn kaj iom konis la japanan. Tamen li plej amas Esperanton. "Tuŝinte Esperanton, mi neniel povas ĝin forlasi. Mi

jam ekamis ĝin," li diris al mi. Eble ĝuste pro tiu amo li metis sur sin plian ŝarĝon — en la komenco de la kuranta jaro li sin ekokupis kiel ekonomia informisto de "El Popola Ĉinio" en la Aŭto-industria Korporacio Aeolus.

Ĉirkaŭ ili viglas junaj samideanoj. En 1987 ili fondis la Esperanto-Asocion de la Dua Aŭtofabriko de Ĉinio (nun ĝi nomiĝas Esperanto-Asocio de la Aŭto-industria Korporacio Aeolus). En la sama jaro ili okazigis grandiozan centjaran jubileon de Esperanto kaj konsultiĝajn aktivadojn. En la korporacia televida stacio ili telesendis la filmon "Hejmlando de Verda Stelo", kiu registris la solenon de la 71-a UK okazinta en Pekino en 1986, por ke multaj laboristoj kaj oficistoj de la korporacio konu Esperanton. Ili fondis la gazeton "Esperanta Interfluo", starigis kontakton kun esperantistoj de koncernaj entreprenoj de ĉiuj provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj de Ĉinio kaj faris scienc-teknikan kaj kulturen interŝanĝon kun pli ol 20 Esperanto-asocioj de aliaj landoj. En ĉiuj grandaj landaj aktivadoj de esperantistoj vidiĝis iliaj viglaj figuroj. Ili eksponis bildojn kaj modelojn de produktoj de la korporacio, ke la kongresanoj havu pli profundan impreson pri la korporacio.

En la Aŭto-industria Korporacio Aeolus laboras multaj sciencistoj kaj teknikistoj. Por ili la samideanoj de la korporacio fondis Esperanto-kursojn elementan kaj mezgradan kaj invitis al la

# Lito el floroj

**V**INTRE la suno malofte vidiĝis en tiu loko, ĉirkaŭita de montoj. Feliĉe la nebulo estis tiel malpeza tiun tagon, ke la sunradioj de ora koloro amuziĝis en la aero. Kaj ŝajnis, ke la tero estis gajigita de tiu ĉarma koloro.


Elirinte el la malhela kabineto, kiu servas al mi kiel laborejo, kaj kie mi enfermas min dum la tuta jaro, mi levis la kapon kaj etendis la brakojn, kvazaŭ mi volus forte brakumi iun.

Laŭ vojeto mi malrapide venis en novan vilaĝon, kvietan kaj elegantan kiel bela ĝardeno. Sed la vilaoj ŝajnis dormantaj kun siaj sunkurtenoj mallevitaj kaj dratitaj pordoj fermitaj. Ne kutimiĝantaj al la monotona vivo en kamparo, la riĉuloj kredeble rifuĝis vintre en movoplana urbo, mi pensis.

Mi haltis sur ligna ponteto por rigardi de malproksime verdetan monton. Herboj velkis kaj restis nur tritiko apenaŭ kreskinta, kiu posedis tiun vintran teron.

Mi sentis bonan odoron venintan de ie kaj rimarkis, turninte la kapon, malgrandan deklivon surŝutitan per floretoj kiel ora monero. Eble ili estis junaj krizantemoj frostorezistaj. Ŝajnis al mi, ke ili flustre interparolis kaj divenis kion mi venis fari en tiu loko.

Mi klinis la kapon kaj vidis mian silueton kurbigi sur la tero. Kiel mi volus kuŝi sur tiuj floretoj silentaj kaj kvietaj, nature formantaj molan liton!



Ĉu estis varmete sub la tero en vintro?

Vintre, ĉu la tero tre malproksima, kie oni enterigis mian amon, estas kovrita sole per velkaj herboj aŭ pompas floroj, kies nomon oni ne scias, formante por ŝi komfortan liton?

Mi certigis, ke tie, kie oni enterigis mian amon, entenas mildecon.

Lasu min silente verŝi larmojn sur la liton el floroj. Iun tagon, ankaŭ mi trankvile ripozos por ĉiam, sub la lito, kie estas probable varme.

Ŝajnis, ke mi venis ĉi tien por serĉi ion, kion tamen mi ne retrovos plu, krom ke ankaŭ mi dormus sub la lito el floroj, en subtera mondo, kie murmurus certe dolĉa rivereto de amo. ■

instruado Esperantajn vicprofesorojn kaj lektorojn el altaj lernejoj de la provinco Hubei. Pro ilia efika laboro la fako de la korporacio pri edukado al oficistoj kaj laboristoj enlistigis Esperanton en sia programo pri fremdlingva instruado al teknikistoj kaj administrantoj kaj difinis, ke tiuj, kiuj kvalifikigis en la lernado de Esperanto, povas ne submetiĝi al ek-

zameno pri dua fremda lingvo dum promocio.

Kun granda intereso mi atente legis la programon. La programo Esperanta havas du partojn elementan kaj mezgradan. Ili klare difinis ne nur la instruajn celojn kaj edukatojn, sed ankaŭ instruajn materialojn, horojn, metodojn kaj postulojn. El tio vidi-

ĝis, ke tiuj samideanoj peneme kaj serioze semas Esperanton.

La junaj esperantistoj de la Aŭto-industria Korporacio Aeolus volas amikiĝi kaj korespondi kun samideanoj tra la mondo. Ilia adreso: Esperanto-Asocio de la Aŭto-industria Korporacio Aeolus, Shiyan, Hubei, 442062, Ĉinio. ■



S-ro Hu Sheng, vicprezidanto de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco, salutas la kongreson.

# Kongreso de

## — Pri la 5-a Pacifika Esperanto

**L**A nomo de Qingdao (Ĉingdaŭ) estis skribita historie sur la flago de la Pacifika Kongreso de Esperanto, simbolanta pacon kaj amikecon pro tio, ke tie okazis la 5-a Pacifika Kongreso de Esperanto de la 17-a ĝis la 22-a de aŭgusto 1992. La kongreson ĉeestis 856 personoj el 18 landoj de Azio kaj aliaj kontinentoj.

La inaŭguro



# kunlaboro kaj progreso

## Kongreso de

Teksto de ZHANG QINGZHEN

Fotoj de LIU SIGONG kaj HAN HONG

La inaŭguron ĉeestis s-ro Hu Sheng, vicprezidanto de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco kaj prezidanto de la Ĉina Akademio de Sociaj Sciencoj; s-ro Chen Yuan, estinta vicministro de la Ŝtata Lingva Komisiono de Ĉinio kaj prezidanto de la Ĉina Esperanto-Ligo; s-ro Chai Zemin, vicestro de la Komisiono pri Eksteraj Aferoj de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco; s-ro Yu Zheng-

sheng (Ju Ĝengŝeng), urbestro de Qingdao; kaj aliaj.

Je la naŭa horo de la 18-a, s-ino Tan Xiuzhu (Tan Ŝiŭgu), vicprezidanto de la Ĉina Esperanto-Ligo, deklaris la kongreson malfermita. S-ro Chen Yuan faris inaŭguran paroladon. Li varme bonvenigis la kongresanojn en la nomo de la Ĉina Esperanto-Ligo kaj de la Organiza Komitato de la kongreso. Li diris:

En la inaŭguro de Zamenhof-busto





Rusa esperantisto s-ro Titajev Aleksandr Borisoviĉ (meze), aŭstralia esperantisto s-ro Keppel Earl Enderby (dekstre) kaj s-ino Tan Xiuzhu, vicĉefredaktorino de EPC

“La kreinto de Esperanto d-ro Zamenhof nomis Pacifikon paca oceano. Hodiaŭ ni okazigas la kongreson kun la temo ‘kunlaboro kaj progresigo en la pacifika regiono’. Tio havas gravan aktualan signifon. La kongreso ne nur akcelas nian lingvan kontaktigon, sed ankaŭ plivastigas nian kunlaboron en la kampoj ekonomia, kultura kaj scienca.” Li esperis, ke esperantistoj en- kaj eksterlandaj pli bone interkomunikiĝos kaj kontribuos por la amikeco inter diverslandaj popoloj.

Urbestro Yu Zhengsheng kore salutis la kongreson. Li esperis, ke post la kongreso la amikoj havos pli da scioj pri la progresanta Qingdao kaj ĝia gastama popolo kaj helpos ilin en akcelo de kunlaboroj inter Qingdao kaj aliaj mondpartoj en diversaj flankoj.

S-roj Hu Sheng kaj Chai Zemin en siaj salutvortoj deziris grandajn sukcesojn al la kongreso.

S-ro Hans Erasmus, kiel reprezentanto de UEA, voĉlegis en la inaŭguro la gratulan leteron de s-ro Ian Jackson, ĝenerala sekretario de UEA. La kongreson salutis ankaŭ reprezentantoj de Aŭstralio, Belgio, Britio, Francio, Germanio, Hispanio, Japanio, Koreio, Nov-Zelando, Rusio, Singapuro, Svedio, Venezuelo, Usono kaj Vjetnamio. Hispana s-ano Jose Ivern donacis statuon de Donkiĥoto kaj librojn al la Ĉina Esperanto-Ligo.

La kongresanoj estis ege kortuŝitaj, ke infanoj de Qingdao kuris kun freŝaj floroj al la podio kaj salutis la kongreson en Esperanto, kaj ĝojis, ke tiom da infanoj bone parolas nian lingvon.

Tuj post la inaŭguro la kongresanoj iris al la hotelo Espero por partopreni la solenan inaŭguron de la

busto de Zamenhof, kiun faris ĉinaj esperantistoj por montri respekton al liaj spirito, idealo kaj sankta afero. S-roj Hu Sheng kaj Chen Yuan delevis tukon de la busto en hurao de la ĉeestantoj.

Dum la kongreso oni varme diskutis pri la kongresa temo. Multaj opiniis, ke estas necese plue disvastigi Esperanton kaj plioftigi kontakton kaj kunlaboron inter pacifikaj landoj. En la Pacifika Universitato 6 esperantistoj prelegis pri kulturo, ekonomio, arto kaj historio.

La Pacifika Kongreso de Esperanto antaŭe okazis en Usono, Kanado kaj Aŭstralio. S-ro Chen Yuan, ĉina lingvisto, iam partoprenis tian kongreson. Li diris, ke la antaŭaj kongresoj estis malpli grandaj, kun partopreno de nur 150-200 personoj, sed la ĉi-fojan ĉeestis pli ol 800 personoj, kio montris, ke multe disvolviĝis la Esperanto-movado en la pacifika regiono.

La kongresanojn tre interesis aktivadoj pri scienco, komerco, turismo kaj aliaj kun tradiciaj ĉinaj karakterizaĵoj aranĝitaj de la Organiza Komitato de la kongreso. La kongresanoj alte taksis tiujn aktivadojn. Iuj el ili rigardis la akupunkturon, mokson, masaĝon kaj kupadon fare de kuracisto de la Qingdao-a Hospitalo de Ĉina kaj Okcidenta Medicinoj kaj la kuirarton de lernantoj de turisma faklernejo de Qingdao. La lernantoj faris tre maldikajn vermiĉelojn el pasto kaj delikatajn gravuritajn manĝaĵojn kaj bongustajn lokajn pladojn de belaj koloroj. Tion gustuminte, diverslandaj gesamideanoj laŭdis senĉese.

Dum la kongreso nemalmultaj kongresanoj komer-



Esperanto-kurso dum la kongreso

cis pere de Esperanto. Ekz. belga samideano venis al la kongresejo kun mendiloj kaj intertraktis kun rilata departemento de Qingdao; kogresano el Zhejiang (Ĝeĝjang)-provinco, disdonis propagandilojn pri ŝtal-lignaj mebloj; Guangdong-delegacio el 40 membroj okazigis en la hotelo Huanghai kunvenon de informado kaj luis ĉambron por ekspozicii kaj vendi televidan telefonon kaj aliajn produktaĵojn. Ili planis partopreni la venontjaran UK en Hispanio por komerco pere de Esperanto; kaj la Esperanto-Propaganda Asocio de Oomoto okazigis kunsidon por konigi la

japanan tradician kulturon.

La amikiĝa vespero, pacifika vespero, junulara vespero kaj surmara ekskurso kaj tuttaga ekskurso al Laoshan-monto havigis al la kongresanoj bonan ŝancon interkonatiĝi kaj amikiĝi. Tri -aŭ kvinope esperantistoj interparolis, informiĝis pri multaj aferoj kaj ekhavis novajn amikojn. Iuj el ili jam korespondis plurajn jarojn, sed ankoraŭ ne renkontiĝis, tiam ili korverŝe interparolis eĉ ĝis profunda nokto.

Dum la ses belaj tagoj la esperantistoj el diversaj landoj ne nur ĝuis ĉarmajn pejzaĝojn de Qingdao, sed ankaŭ spertis la gastamecon de ĝiaj loĝantoj. En la harmonia kaj varma etoso finiĝis la 5-a Pacifika Kongreso de Esperanto.

En la fermo matene de la 22-a, reprezentanto de la Aŭstralia Esperanto-Asocio voĉlegis la kongresan rezolucion: "En la pacifika regiono kunekzistas evoluintaj kaj evoluantaj landoj. La lastaj aspiras pri prospero en ekonomio, sciencoj, teknikoj kaj kulturoj. Esperantistoj en ambaŭ-faktoraj landoj klopodu pliiintensigi la kunlaboron surbaze de la reciproka utileco kaj kunprosperado... ni forte sentas la bezonon starigi kunordigan centron por esperantistoj en la pacifika regiono..."

En la fermo s-ro Chen Yuan faris entuziasman paroladon. Li diris, ke nun ni povas fiere deklari, ke la 5-a Pacifika Kongreso de Esperanto akiris grandan sukceson.

Japana samideano s-ro Hisasi Kitagawa, komisiite de UEA, donacis la libron de d-ro Ulrich Lins "La Danĝera Lingvo" al la Ĉina Esperanto-Ligo kaj lokaj Esperantaj organizoj de Ĉinio.

Nome de la Packomitato de Primorje-Regiono de la Rusia Federacio kaj la Vladivostoka Esperanto-Klubo "Pacifiko" invitas la 6-an Pacifikan Kongreson de Esperanto al Vladivostoko. La kongreso kore bonvenigis la inviton. ■



S-ro Liu Zhen (meze), respondeculo de Qingdao, s-ro Zou Guoxiang (dekstre) kaj japana esperantisto s-ro Deguchi Kyotaro




S-ro Chen Yuan (meze), prezidanto de la Ĉina Esperanto-Ligo, kaj usona esperantistino s-ino Lucille C. Harmon (maldekstre)




S-ro Chai Zemin (dekstre), vicprezidanto de la societo "Amikoj de Esperanto", intervidiĝas kun brita esperantistino s-ino Beatrice Clarke.

S-ro Hans Erasmus (meze) el la Eŭropa Komunumo, s-ro Zou Guoxiang (maldekstre), ĝenerala sekretario de la Ĉina Esperanto-Ligo, kaj s-ino Li Yuping, vicprezidanto de ĈEL







S-ro Zhang Qicheng (meze), vicprezidanto de la Ĉina Esperanto-Ligo, kaj alilandaj esperantistoj

Kongresanoj en vilaĝo de Qingdao

S-ro So Gilsu (meze), estrarano de UEA pri azia agado, interparolas kun ĉina esperantisto.



S-ro Yosimi Umeda (la dua de dekstre), iama vicprezidanto de UEA, kaj lia edzino ĉe festeno



# Facetoj de la 5-a Pacifika Kongreso de Esperanto

## PLEJ BONA DONACO

Okaze de la 5-a Pacifika Kongreso de Esperanto, Hualian-Magazeno de Qingdao aranĝis specialan vendotablon por memoraĵoj de la kongreso. La magazeno ankaŭ organizis subskribadon la 16-an de aŭgusto. Antaŭtagmeze subskribis pli ol dekmil urbanoj kaj alilokaj turistoj. En la tagmezo la magazeno donis la paperrulaĵon kun subskriboj al la organiza komitato de la kongreso.

## FAKKUNSIDO KUN PLEJ MULTAJ ĈEESTANTOJ

La Esperanto-Propaganda Asocio de Oomoto (EPA) de Japanio organizis sian fakkunsidon en Zamenhof-salono en la 19-a de aŭgusto. Antaŭ la fakkunsido ili gluis afiŝon sur la anonctabulo. Dum la fakkunsido oomotano, levante sa-



Diverslandaj esperantistoj

man afiŝon, staris en la vestiblo de la kongresejo por allogi pli da ĉeestantoj. Ĉ. 200 kongresanoj gluis la

prezentadon de floraranĝo, teceremonio kaj japana kaligrafio.

## MUZIKO KIEL INTERLINGVO

En bankedo multaj kongresanoj kantis sub la akompano de orkestro. La plej vigla el ili estis pli-ol-80-jara s-ro Nisikawa Toyozo. Li prezentis 2 kantojn. Kiam la orkestro ludis la muzikon de la ĉina kanto "Sur la ora monto de Pekino", ĉiuj ĉeestantoj manfrapis laŭ la takto. Liu Zhen, vicprezidanto de la organiza komitato, prezentis la kanton "Amkanto en Kangding", kio puŝis la etoson de la bankedo al la kulmino.

## PLI KAJ PLI MULTAJ ESPERANTAJ FAMILIOJ

En la vagonaro al Qingdao mi hazarde renkontiĝis kun geedzoj Zhang Yongle kaj ilia 3-jara filino,

*(Daŭrigo sur p. 35)*

Infanoj de Qingdao salutas la kongreson.



# Antikvaj pekin-stilaj stratoj sub pagodo

Teksto kaj fotoj de LING YOUJUAN



Loĝantoj en ripozo

Krom famaj historiaj restaĵoj, en Pekino troviĝas ankaŭ stratetoj inter loĝdomoj, kiuj ankoraŭ konservas tradiciajn pekinajn karakterizaĵojn.

Dum kelkaj tagoj kun fotografilo mi iris en pekin-stilaj stratetoj ĉirkaŭ la Templo de Blanka Pagodo, kio mirigis la loĝantojn kaj vekis ilian scivolemon. Mi sentis min kvazaŭ en malproksima urbeto.

La templo troviĝas en movoplena kvartalo en Pekino. En la templo staras tibet-stila pagodo kun historio de 800 jaroj, la plej antikva kaj granda en Ĉinio. La pagodo rigardas malsupren al la ĉirkaŭaj ter-etaĝaj domoj kun tegmento el grizaj tegoloj, kio povas esti rigardata kiel vidindejo de Pekino. Dank' al tio, la ĉirkaŭaj stratetoj fariĝis bone konataj lokoj, kie oni okazigis foiron. En foiraj kaj festaj tagoj oni starigis vendobudojn kaj scenejon ĉe la templo. Homoj svarmis tie por ĝui frandaĵojn, ĵonglaĵojn kaj lokajn operojn. Jaro post jaro, komercistoj, etvendistoj kaj ĵonglistoj fiksloĝiĝis tie, kaj iom post iom formiĝis loĝdomoj kun kvadrata korto kaj stratetoj pekin-stilaj.


Oni ofte vidas maljunulojn loĝantajn en tiaj stratetoj, kiuj babilas sidante antaŭ la korto aŭ sub arbo. Ili eble estas indiĝenoj.

La loĝantoj senescepte per rigardo salutas la alilandanojn, kiuj venas tien por viziti la templon kaj la ĉirkaŭajn antikvajn pekin-stilajn stratetojn kaj ilin foti, tamen ili, ĉiutage sin okupantaj pri siaj

propraj aferoj en la loĝdomoj nur kelkajn metrojn for de la pagodo, ŝajne neniam ĝin vidas.

En iu strateto kelkaj maljunuloj sidis sur la ŝtona perono de malnova kvadrata korto. Ili parolis pri geknaboj, kiuj ludas gimnastikan ringon, kaj pri siaj amikoj opero-amantoj, poste ili babilis pri la metodo de sia longa vivo. Ili rakontis al mi la historion de la korto, post kiam mi fotis la antikvan kortopordon kun ligna kaj brika gravuaĵoj. Ĝi estis konstruita en la komenco de la kuranta jarcento, tute sama kiel la najbara korto. En tiuj du kortoj loĝis du fratoj kaj iliaj familianoj. 80 jarojn poste, la loĝantoj jam ŝanĝiĝis. "La korto neniam ŝanĝiĝis post tiom longa tempo?" mi demandis. "Ne," unu el ili respondis, "40 jaroj pasis, post kiam mi enloĝiĝis en 1950. La stratetoj neniam ŝanĝiĝis, krom ke la loĝantoj multiĝis. Nun en la korto jam loĝas 8 familioj." La stratetoj estas kvietaj dum tago, tamen movoplenaj en tempo, kiam oni iras al kaj revenas de laboro. Frumatene, elirinte el siaj kortoj, iuj biciklas al laboro, aliaj piediras al lernejo kun ruĝa koltuko kaj triaj triciklas por komercado. La stratetoj estas antikvaj, sed la gejunuloj tie loĝantaj portas modajn vestojn. Oni ne povas diri, ke la stratetoj ne ŝanĝiĝis.

Kvankam maljunuloj, kiuj ne volas disiĝi de la antikvo, estas kontentaj pri vivo en tiaj loĝdomoj kun kvadrata korto, tamen plej multaj loĝantoj esperas, ke ili kiel eble plej baldaŭ transloĝiĝos en etaĝdomojn kun necesaj ekipaĵoj. ■



Antikva pekin-stila strateto ĉe la pagodo

# Indekso de EPC 1992


	nr. pĝ.		nr. pĝ.
<b>POLITIKO</b>		altlernejoj	4.39
Eksterordinara sesio	7.6	Mikroirigacio en Ĉinio	4.30
<b>EKONOMIO</b>		Teknika societo de ĉinaj laboristoj	4.22
Vizito de la Dalian-a Ekspluata Regiono	1.35	Sinteza utiligo de metano en Ĉinio	5.12
Urbo kaj medio	1.23	Chen Zhangliang, reformisto por novaj varioj de plantoj	5.22
Ĉe la enfluejo de la Flava Rivero	1.8	Vortoj de Konfuceo	7.43
Ŝuldĉeno en Ĉinio kaj ĝia likvido	2.6	Songŝo sub ginkoj	8.6
Grasiĝas salikokoj en ora aŭtuno	2.14	Rigardi la hodiaŭan postĝinta	10.8
Havenurbo Ningbo	3.8	Por eduki mensdebilajn infanojn	11.39
Industria regiono en montaro	4.6	Revenigu infanojn en lernejon	12.6
Antaŭ kaj post la reguligo de la ĉina ekonomio	5.6	<b>HISTORIA MISTERO</b>	
La unua bazaro de pogrando vendata greno en Ĉinio	5.8	Trovo kaj perdiĝo de fosilia kranio de Pekin-homo	4.12
Modaj fasonoj de Moniza	5.23	Diino antaŭ 5 000 jaroj	6.40
Pri la akvoutiliga konstruo de Sanxia	6-7	Kion signifas geometriaj figuroj sur koloraj fajencaĵoj?	8.48
1. Grandega konstruo trans la jarcento	6.19	Iom pri "Ji Ĝing"	10.42
2. Kion la konstruo de Sanxia alportos al Ĉinio	6.19	Naskiĝo de la ĉina skribolingvo	12.16
3. Ĉu likvidiĝos maltrankvilo?	7.20	<b>ANTIKAJ ĈINAJ FILOZOFOJ</b>	
Reformado de "ruĝa dezerto"	6.6	Poeto kaj filozofo	1.43
Disvolviĝo de agrikulturaj servoj en Ĉinio	7.38	Korismo kaj doktrino pri bonkoreco	2.39
La unua nuklea elektrejo de Ĉinio	8.21	Sukcesa epitomiganto de materiisma filozofio	3.39
Hainan — la plej granda speciala ekonomia distrikto de Ĉinio	9.20	<b>SPORTO KAJ HIGIENO</b>	
Ekspluato de Yangpu	9.30	Amikiĝi per uŝuo	2.14
Changyu-vinoj iras al la monda merkato	9.16	Xie Jun — monda ĉampiono de virina ŝakludo	3.6
Por realigo de la revo	10.6	La 4-a Nacimalplimulta Sportkunveno de Ĉinio	4.8
Prosperaj urbetaj entreprenoj en Wuxi-gubernio	10.21	Sportaj steloj kaj iliaj gepatroj	5.38
Longkou en malfermado	11.34	La tria akrobata konkursejo de la mondo	5.35
Huaxi — urbo en vilaĝo	11.8	Pan Shuren, ĉin-medicina kuracisto pri tiroidaj malsanoj	6.43
Akcio en Ĉinio	12.8	De revo al realo	6.49
Denove aperis la "nevidita" urbo	12.30	Pekino klopodas por gastigi la Olimpiajn Ludojn en 2 000	7.12
Pri vojaĝo en la antaŭurbo de Dalian	12.37	Boke-o en disvolviĝo	8.38
<b>KULTURO, EDUKO, SCIENCO KAJ TEKNIKO</b>		En la halo de kalisteno	8.18
Geknaboj de 16 jaroj	2.42	Pri sportado de laboristoj kaj oficistoj en nordorienta Ĉinio	9.8
Helpi Jinggangshan per sciencoj kaj teknikoj	3.12	Prof. Hu Yunyu — sukcesinto en	
Disvolviĝantaj laboratorioj de ĉinaj			

	nr. pĝ.		nr. pĝ.
grefto de heterogenaj ostoj	9.40	Ponto inter la orienta kaj okcidenta	
Por ilia resaniĝo	9.42	pentrartoj	9.27
Amuzaj sportoj	10.40	Rapida torento	11.27
Granda helpo al sportistoj	11.40	<b>SOCIA VIVO</b>	
Kiom forta la ĉina sporto?	12.10	Intervjuo kun tri advokatoj	1.14
Por resanigi anus-malsanulojn	12.42	Vesperfoiro de manĝetoj en Pekino	2.30
<b>POR VIA SANO</b>		Kial ili povas esti centjaruloj?	4.37
Gimnastiko sur seĝo	1.34	Ĝenerale pri la nuna vivo de ĉinoj	5.40
Ĉigong-aj irado kaj staro kontraŭ		Mi ŝatas la profesion de ĉiĉerono	8.40
neŭrastenio	3.26	Ŝipkonkurso en Qintong	8.9
Kuŝa ĉigong-o	5.48	Ĝjaŭzi-o, tradicia manĝaĵo de Ĉinio	10.36
Spira gimnastiko kontraŭ bronkito		Senlaca fotistino	10.38
kaj pulma emfizemo	7.34	En mita mondo	10.24
Spira gimnastiko kontraŭ bronkito		Freŝaj floroj ŝike furoras en Pekino	11.6
kaj pulma emfizemo (Daŭrigo)	9.39	<b>LOĜDOMOJ KAJ MOROJ</b>	
Bonhumoriga gimnastiko kontraŭ		Daj-aj bambuaj domoj inter verdaĵoj	1.45
hipertensio	11.41	Sub alta tegmentego	2.44
<b>MEDICINA KONSULTEJO</b>		“Muzeo de loĝdomoj de Ming- kaj	
Nova terapio kontraŭ hepata fibriĝo	2.22	Qing-dinastioj”	3.44
<b>AMUZOJ</b>	1-12	Montvilaĝo de ĉjangoj	4.44
<b>LITERATURO KAJ ARTO</b>		Vojaĝo al antikvaj urbeto kaj vilaĝoj en	
Lerneja teatro	1.16	montregionoj	5.44
Urbo de jango-danco	1.31	Loĝdomoj de tibet-nacianoj en Kangba-	
Reaperigo de la historio	2.19	regiono	6.32
Filinoj de Muzo	3.23	Antikva vilaĝo sur la Leŭsa Altebenaĵo	7.44
Ora kaligrafio de Zhao Zhizhong	3.18	Luzhi — akvolando sude de Yangzi	8.44
Venĝo pro la hundo (Novelo)	3.48	Kaverndomo sur la Leŭsa Altebenaĵo	9.44
Skulptarto de Quyang	4.34	Prosperas la vilaĝo Liuminying	10.44
Ŝi mem estas muziko	6.30	Unua dombloko en suda Ĉinio	11.44
Rulŝtonaj bildoj de Zhou Jun	6.46	Antikva strateto en la prospera urbo	12.44
Pri la Tria Ĉina Arta Festivalo	7.8	<b>SUR STRATOJ</b>	
Lasta vido (Novelo)	7.48	Fremdlandaj etvendistoj en Pekino	2.27
Nuo-maskoj kaj nuo-opero	7.32	Homoj serĉantaj sciojn surstrate	4.27
Kanto kaj danco de nordorienta Ĉinio	8.30	Vizito al legombazaroj	6.27
La pasinteco kaj estanteco de pekina		Sub semaforo	8.27
opero	9.34	Floroj sur la stratoj	10.27
Fingra pikturo de Gong Naichang	10.34	Antikvaj pekin-stilaj stratetoj sub pagodo	12.27
Reĝo de kantado (Novelo)	10.18	<b>NACIECOJ</b>	
Pekina popola arta teatro	11.30	La plej alta islama lernejo de Ĉinio	4.41
Arta muzeo kun propraj trajtoj	12.15	Trezoroj de la tibet-nacia arto	6.11
<b>ARTOJ DE ĈINIO</b>		Arĝentaj ornamaĵoj de mjaŭ-oj	6.36
Liu Yitao, eminenta pentristo de		Viva budho revenis al sia hejmloko	7.23
Xishaungbanna	1.27	Vojaĝo al Gyaze	8.36
Ĉinaj olepentraĵoj en evoluo	3.27	Kornohavaj mjaŭ-oj	9.36
Ye Qianyu, “makisano” en la ĉina		La tigrototemo de ji-oj	12.43
pentrista rondo	5.27	<b>VOJAĜO KAJ VIDINDAJ LOKOJ</b>	
Bela animo necedema antaŭ malfaciloj	7.27		

	nr. pĝ.		nr. pĝ.
Unu tagon en Shaolin-templo	1.12	<b>ESPERANTO</b>	
Vizito en la hejmloko de Mengzi	1.41	Dek jaroj de la Ĉina Esperanto-Eldonejo	1.18
Antikva urbeto Qingyan	2.49	Irigi boaton per akvo	2.17
Qingdao, bela ĉemara urbo	2.8	Karmemore al Lusin	3.14
Gustoplena primora vojaĝo	2.23	Memore al nia kara favoranto	3.34
La ĉina turisma jaro 1992	6.8	Memorinda tago por la ĉina E-movado	3.20
Disvolviĝanta Boshan	7.30	Renkontiĝo en Tangshan	4.19
Vizito al Ningbo	8.12	Urĝe bezonata: PAF (Plena Analiza Fonetiko)	4.16
Unutaga vojaĝo en "Belega Ĉinio"	11.23	Huanghai bonvenigas vin!	5.14
<b>LAŬ ANTIKVA VOJO AL TIBETO</b>		Mi kaj Verda Majo	5.18
I. Antikva vojo al la firsto de la mondo	1.49	Promenado inter la numeraloj	6.13
II. Okcidenten el Chang'an	1.49	Vieno, urbo de artoj, invitas al unusemajna Esperantujo	6.16
III. Al la Flava Rivero	2.51	Prof. Gaston Waringhien restos ĉiam ĉe ni	8.42
IV. Hejmloko de la salarjoj	3.51	Kiel majstro longe li nin gvidos (Poemo)	8.42
V. Vizito al la valo Hehuang	4.51	Ĉu la internacia komerco bezonas Esperanton?	8.43
VI. Sonorado de Qutan-templo	5.51	Rakonto pri filatelaĵoj	8.8
VII. Tu-naciaj moroj	6.51	Najbaro, parenco, amiko	9.12
VIII. Antikva urbo Xining sur altebenaĵo	7.51	Nepalo triafoje	9.14
IX. En la naskiĝloko de Congkapa	8.51	En Esperanto-kurso	10.15
X. Al la Sun-Luna Monto	9.51	Esperanto en la vivo de urala skolto	10.13
XI. Qinghai-lago sur altebenaĵo	10.51	Impresoj pri Vieno, E-kongreso kaj aliaj	11.19
XII. Bohai vokas de malproksime	11.51	La aŭroro de Pacifiko	11.14
XIII. Sanktejo en la historio de la rilatoj inter tibetanoj kaj hanoj	12.51	Karmemore al Ludoviko Enizan	11.22
<b>ANTIKAĴOJ KAJ ARKEOLOGIO</b>		Kongreso de kunlaboro kaj progreso	12.20
Konko, la plej antikva mono en Ĉinio	2.18	Facetoj de la 5-a Pacifika Kongreso de Esperanto	12.26
Paleoantropologia kaj paleolitika arkeologio de Ĉinio	3.16	Esperantistoj viglaj en montregiono	12.18
Kupra minejo antaŭ 2 000 jaroj	5.42	Naskiĝo de scienca verkaro en Esperanto	12.39
Vizito al la Ĉina Aviada Muzeo	7.35	Antaŭparolo por "Aktoj de Internacia Scienca Akademio Comenius"	12.40
Antikvaj bronzaĵoj de Ĉinio	8.14	<b>SUR NIA LIBROBRETO</b>	
La origino de la ĉina agrikulturo	11.12	Ĉiam konsulti fakulojn	4.18
<b>AMIKECO</b>		Infano ne krias, eldonisto ne scias	6.45
Miaj lastatempaj impresoj pri Ĉinio	1.20	El la latina, entuziasmige	8.20
Ĉe belgaj amikoj	3.37	Du libroj pri atombombado super Hiroŝimo	11.16
Vizito al Oostende	5.16	<b>POR KOMENCANTOJ</b>	
La aŭta industrio, trafika blokado kaj media polucio	6.42	Leporo kaj serpento	1.42
Gastado ĉe ĉinaj geamikoj	7.14	Fari neĝan homon	2.38
Esperante tra suda parto de Ĉinio	7.16	La saĝulo, la stultulo kaj la lakeo	3.41
Por nova homa civilizacio	9.6	Caixia	4.31
Memore al verda vojaĝo en Japanio	10.12	Honesta knabineto	5.50
La simbolo de amikeco inter du foraj urboj	10.31	Klubo de Malbeluloj	6.18
Kiel mi konatiĝis kun nia ĉina amiko	11.15		
Homoj savantaj blindulojn el mallumo	12.34		

	nr. pĝ.		nr. pĝ.
La sepkolora ĉevalo	7.18	Reveno	3
Reciprokutita kontribuado	8.16	Printempo	4
Stranga historio	9.19	Kaskado	5
Kredu vian infanon	10.16	Inter bambuaroj	6
Puno al mastro	11.17	Kvieta plaĝo	7
Lito el floroj	12.19	Vilaĝo en neĝa montaro	8
ESP-NOVAĴOJ	1-12	Besto en montarbaro	9
<b>ALIAJ ASPEKTOJ</b>		Cigno	10
Al niaj legantoj	1.6	Floro en sonĝo	11
EL ĈINAJ GAZETOJ	1-12	En aŭtuno	12
INTER NI	1-12	<b>KOLORAJ BILDOSERIOJ</b>	
KURANTAJ AFEROJ	1-12	Vespera foiro de frandaĵoj ĉe Liangma-	
BILDOJ SUR LA KOVRILO		rivero	2.32
Aŭtuno (Ĉinstila pentraĵo)	1	Ĝenroj de ĉinaj naciecoj	3.32
Antikvaj tibetaj kostumoj	2	Konkurso de sportaj dancoj	3.42
Xie Jun, monĉa ĉampionino de virina		Kalabasaj skulpturo kaj pikturo	4.32
ŝakludo	3	Mirakla tera arbaro	4.24
Baj-a knabino en moda vesto	4	En ordinara tago	5.10
Fajfanta knabeto	5	Sutro-presejo en Dege — tibet-nacia	
Gaje dancanta tibeta paŝtisto	6	kultura trezorejo	5.32
Knabino	7	Ŝtonaj kruĉoj de Tao Changjun	5.20
Pandidoj kun bredisto	8	Arĝentaj ornamaĵoj de mjaŭ-oj	6.36
Prezentado sur placo	9	Fremdlandaj studentoj en la Pekina	
Mastrino de tetrinkejo	10	Teatra Lernejo	9.32
Mjaŭa-a knabino	11	Interesaj ŝtonoj	10.32
Ĉinaj kaj alilandaj esperantistoj dum la		Popola arto de Kangba	11.32
5-a Pacifika Kongreso	12	Domoj el tritikaj tigoj	12.36
<b>BILDOJ INTERNE DE LA KOVRILO</b>		<b>FOTOJ FARITAJ DE E-ISTOJ</b>	
Surstilza jango-danco	1	(Sur la dorskovrilo)	
La religia festo de la Garze-a Tibet-nacia		Tulipoj	1
Aŭtonoma Subprovinco de Sichuan	2	Restoracio "Beijing City"	1
Loĝdomoj de kamparanoj en Jiangxi	3	Pejzaĝo de Huangshan-monto	2
La unua ponto super Huangpu-rivero	4	Ĉina ĝardeno en Biddulph	2
Suzhou-strato en antikva stilo en la		Unua neĝo	3
Somera Palaco de Pekino	5	Neĝa fungo	3
La Wuhan-a Pontego super Yangzi-rivero		Somermeza danco en parko	5
rigardata de malproksime	6	Knabineto en printempo	5
Malgranda prezenta trupo sur strato	7	La lago Össjäsjön ĉe krepusko	6
Festivalo en suda Ĉinio	8	Publika domo en vilaĝo	6
La plej granda ĉina speciala ekonomia		Antikva konstruaĵo	7
regiono Hainan en konstruado	9	Montserrat-monto	7
Renkontiĝo de diversnaciaj junuloj		Surroka bildo	8
sur Tian'anmen-placo	10	Hispana palaco de la 17-a jarcento	8
Drako-danco	11	Ligna kirko en Östmark, Svedio	10
Fiŝkaptado sur glacio	12	Norvega spegulo	10
<b>FOTOJ SUR PAĜO 4</b>		Norvega nokto	11
Ponto en luna nokto	1	Akvokastelo	11
"Gruo"	2	<b>ĈINAJ POŝTMARKOJ</b>	
		(Sur la dorskovrilo)	
		Raraj sovaĝaj bestoj	9






Butiko en la strateto

Alilandaj turistoj en la strateto

Maljunuloj en la strateto



# Denove aperis la “nevidita” urbo

Teksto de ZHENG ZHENJIE

Fotoj de ZHENG YONGJI

**F**INE de la 70-aj jaroj oni kun miro rimarkis, ke la grava industria urbo de nordorienta Ĉinio Benxi (Benŝji) ne vidiĝis sur la foto farita de media satelito de Usono.

## KARBO-ŜTALA URBO

Benxi situas en la sino de montoj. Ĝi estas industria urbo ĉefe produktanta feron, ŝtalon, karbon kaj cementon. En la urba kvartalo kun areo de 43.2 kvadrataj kilometroj funkcias 420 fabrikoj, el kiuj pli ol 200 ellasis fuman polvon. La urbo ĉiujare ellasis 87.5 miliardojn da kubmetroj da venena gaso, 91 mil tunojn da fuma pulvoro kaj 122 mil tunojn da industria polvo. En 1985 tie estiĝis la plej serioza fum-polva polucio, kiu superis la normon je 3 obloj kaj estis pli serioza ol tiu en Londono okazinta en la 50-aj jaroj. La serioza polucio oftigis la urban nebuliĝon, oni multe suferis de la fuma polvo kaj venena gaso. En pli ol duono da tempo en ĉiu jaro la videbleco de aero estis inter 30-50 metroj. Ja ne estis strange, ke sur la satelita foto nevideblis la urbo Benxi. La rezulto estis komprenebla: la polucio jam minacis la vivon de la urbanoj.

La morbokvanto de la spira kanalo de la urbanoj okupis la unuan lokon en la tuta lando. La morbokvanto de pulma kancero kaj aliaj kanceraj kreskis jaron

post jaro kaj ofte okazis infektaj enter-malsanoj. Ĥirurgo de iu aliloka hospitalo faris torakan operacion al malsanulo. Pri ties nigra pulmo la ĥirurgo konstatis, ke tiu estas loĝanto de Benxi. Li diris trafe. Iuj veis, ke en Benxi la 800 000 loĝantoj similas al 800 000 polvosuĉiloj.

Talentuloj iris aliloken por labori. Diplomitaj studentoj ne volis labori en Benxi. Troviĝis ankaŭ iuj alilokanoj, kiuj petis kontraŭpolucian subvencion, se ili kunvenis en Benxi.

## POR KE LA ĈIELO SERENIĜU

Meze de la 80-aj jaroj la loĝan-

toj de Benxi pli kaj pli klare konsciis, ke polucio estas la plej granda problemo malutila al la urbo. La perspektivo de la urbo dependas de la batalo kontraŭ media polucio.

Por levi la popolan aktivecon pri la mediprotektado, la koncerna departemento iniciatis aktivadon por elekti 10 entreprenojn plej serioze poluciantajn. En la sekvan tago post publikigo de la informo, la koncerna departemento ricevis mil balotilojn. Fine metalurgia, karba, konstru-materiala kaj kemiindustria entreprenoj estis prijuĝitaj kiel la plej serioze poluciantaj entreprenoj. La nomoj de la entreprenoj kaj iliaj estroj estis

En la urbocentro de Benxi



publikigitaj.

Tuj sekve oni komencis efektivigon de la 7-jara projekto por forigi la polucion. Ĝia unua periodo daŭros 3 jarojn.

Oni faris jenan komparon: La medio estis purigita per monpaperoj. Kompreneble la media reguligo bezonas grandan investon. La Benxi-anoj ja faris ĉion eblan por ŝpari monon por reordigi la medion.

La Benxi-a Ferŝtala Kompanio kun fiksa kapitalo de 4 miliardoj da juanoj estas unu el la ĉefaj industriaj enspezantoj de la urbo. Ĝia polucio konsistigis ĉ. 80% de la totala kvanto de la urba polucio, pro tio ĝi nature fariĝis ĉefa ŝuldanto por la media reguligo de la urbo. En la lastaj jaroj ĝi elspezis entute 100 milionojn da juanoj por media reguligo kaj plenumis 10 gravajn konstruojn tiuflanke. En la nomita kompanio oni rigardas mediprotektadon kiel unu el la ĉefaj taskoj plenumendaj por la respondeculoj de la fabrikoj kaj mine-

joj. Kie la medio estas malpura, tie oni pendigas flavan tabulon por averto kaj la tutaj laboristaro kaj oficistaro de la loko estos monpuntaj. La laborista grupo, respondeanta pri konstruo de elektra senpolvigaj instalaĵoj de la altforno n-ro 9, ne ricevis salajron dum 3 monatoj pro manko de mono, tamen la laboristoj energie laboris kiel antaŭe. Ili diris, ke media reguligo ja estas sama kiel savo de homoj, tial ili ne timis malfacilon nek lacon.

La Kemia Fabriko de Caohekou havis 10 ellasejojn de malutilaj akvo kaj skorio, kiuj poluciiis la malsupran basenon de la Caohe-rivero je 17 km. Rezulte de tio la riverakvo malpurigis kaj malaperis akvaj produktaĵoj. Ĉar la rivero trafluas ankaŭ la urbon Dandong, kiu limtuŝas Koreion, tial la konfliktoj inter la urboj pri kompenso ofte okazis. La provinca kaj urba registaroj ordonis, ke se la fabriko ne forigos sian poluciadon, oni ĉesigu ĝian produkton. La seriozaj faktoj konigis la laboristojn, ke la

media protektado koncerne ilian vivtenadon, tial ili asignis monon por forigo de la polucio, eĉ kiam la fabriko havis deficieton. Antaŭ nelonge ĝi plenumis la mediprotektan konstruon, por kiu la fabriko elspezis 2 milionojn da juanoj. Nun la fabriko jam atingis la normon de media reordigo kaj reutiligas la poluciaĵon kiel kemiindustriajn materialon. Nun Caohe-rivero

jam rehavigis al si la antaŭan fizionomion. La antaŭe malpurigita rivero klarigis kaj en ĝi denove aperis fiŝoj.

Por disvolvi la ekonomion kaj samtempe ne kaŭzi novan polucion, la urbo nun praktikas politikon de mediprotekta kompenso. Ekz. la Benxi-a Ferŝtala Kompanio deziras instali 2 generatorarojn kun kapacito de 50 000 kilovattoj, kio sendube pliigos la fuman ellason. La Mediprotekta Buroo de Benxi konsentas pri ĝia plano sub la kondiĉoj, ke la kompanio devas hejtigi loĝdomojn kun areo de 1 000 000 kvadrataj metroj per sia superflua varmo. Tio signifas, ke nova granda fumtubo anstataŭos dekojn da malgrandaj fumtuboj de varmcentraloj, tial la totala kvanto de la ellasita fumo ne pliigos.

## DENOVE SERENIĜIS LA ĈIELO

De 1989 la tieaj loĝantoj praktikis la politikon kombini la reordigon de teknika inĝenierio kun la biologia. Ili konstruis areon de 32.8 kvadrataj kilometroj, kie la fumpolva polucio estas eterne bridita, bonordigis 348 kaldronegojn kaj reformis 46 fornojn. Dank' al tio en la aero la polvo malpliigis je 0.15 miligramo en ĉiu kubmetro kaj sulfurilo je 0.1 miligramo en ĉiu kubmetro. El la antaŭaj 33 flavaj kaj nigraj fumkolonoj levigitaj el la fornoj 14 estis radikale subigitaj, dum la aliaj multe malfortigis. Samtempe kun tio, la Benxi-anoj plantis 14 milionojn da arboj en la urbaj kvartaloj. Nun tie estas ŝtata arba parko kun areo de 225 kvadrataj kilometroj, kiu ludas plurfunkcian rolon.

La aero fariĝas pli kaj pli freŝa en la urbo Benxi.


Usona ĵurnalisto, fervora al la "verda paco", post esploro de la media reordigo de la urbo, diris, ke kvankam la media reordigo en Benxi komenciĝis malfrue, tamen en tiu kampo ĝi en tri jaroj jam kuratingis Los-Anĝeleson, kiu faris median reordigon 10 jarojn. ■

Kontrolo de la atmosfero






Benxi hodiau




Benxi en la pasinteco





Promenejo



Rivero post forigo de polucio

# Homoj savantaj blindulojn el mallumo

## — Pri la Fluga Oftalmologia Hospitalo Orbis

**E**L la malsanoj de la homaro blindeco estas la plej dolora. Statistiko montras, ke nun en la mondo estas pli ol 40 milionoj da blinduloj kaj 520 milionoj da homoj suferantaj de blindigaj malsanoj, kaj ke en Ĉinio estas pli ol 7 milionoj da blinduloj. Estas klare, ke la peniga laboro por kuraci okulajn malsanojn postulas de la socio multe da fortoj kaj longtempan laboron. Inter la sennombraj organizoj de prevento kaj kuracado de okulaj malsanoj la Projekto Orbis plej interesas per sia originala servomaniero.

La Projekto Orbis nomiĝas ankaŭ la Orbis Internacia Fluga Oftalmologia Hospitalo. La nomo ŝajne impresas, ke ĝi estas ambulanco en milito. Sed fakte ĝi estas medicina fluga hospitalo de oftalmologia instruado. Ĝi estis fondita en 1982. Laŭ la celo difinita en la komenco de la fondiĝo ĝi estas senprofita ekster-politika filantropia medicina organizo. Ĝi klopodas por efektiviĝi tutgloban planon pri ekstermado de blindigaj malsanoj.

La iniciatinto de Orbis estas usona oftalmologo s-ro David Patton. Laŭdire, komence li planis ekipi aŭton per diversaj medicinaj instrumentoj kaj vojaĝi tra la mondo por kuraci malsanulojn je vidkapablo. Poste, dank' al la monhelpo de iuj grandaj entreprenoj, Orbis aĉetis fuzaviadilon

DC-8 kaj starigis la unuan flugan hospitalon en la mondo. La hospitalo konsistas el operacia ĉambro, ekzamena kaj laser-kuraca ĉambro, ripoza ĉambro kaj video-aŭda ĉambro ekipita per plej modernaj aparatoj. La tasko de la hospitalo estas laŭplane flugi de unu lando al alia por fari en la aviadilo demonstran operacion, okazigi kun sidon, interŝanĝi sperton kaj trejni okulkuracistojn kaj flegistinojn de la vizitataj landoj.

La nuna plenuma prezidanto de Orbis estas brita oftalmologo d-ro Oliver Foot. La fluga hospitalo nun havas 25 konstantajn membrojn, nome aviadistaro, medicinistoj, teknikistoj kaj flegistinoj. La okulkuracistoj estas

elektitaj el volontuloj kaj lastatempe du ĉinaj kuracistoj estis elektitaj. Ĉiufoje tri aŭ kvar okulkuracistoj iras respektive de sia lando al la celloko por fari demonstran operacion. La trejna kurso daŭras ĉ. tri semajnojn. Ili montris laŭdindan sindonemon en plenumo de la nobla laboro.

En la pasintaj dek jaroj Orbis vizitis 70 landojn, profundigis en postigintajn regionojn kaj tie plenumis cent senpagajn planojn. La kuracistoj de Orbis resanigis pli ol dek mil malsanulojn kaj rehavigis al ili vidadon. Kaj samtempe la kuracistoj instruis modernan oftalmologian teknikon al dek mil okulkuracistoj kaj flegistinoj de diversaj landoj.

Preskaŭ tuj ĉe sia fondiĝo Orbis kontaktiĝis kun Ĉinio kaj poste tiu kontakto fariĝis tre intimaj interrilatoj. En 1982 Orbis vizitis Kantonon kaj poste Pekinon, Ŝanhajon, Taiyuan (Tajjŭan), Xi'an (Ŝji'an), Changsha (Ĉangŝa) kaj Chengdu (Ĉengdu). La kunlaboroj kaj interŝanĝoj inter Orbis kaj Taiyuan estas la plej viglaj. Post 1989, kiam la fluga hospitalo unuafoje vizitis Taiyuan, Orbis sendis dufoje specialistan grupon al tiu ĉefurbo de Shanxi (Ŝanŝji)-provinco, por akademia

Zhang Shaoqi (sidanta sur lito), kanada oftalmologo d-ro Taylor (la unua de maldekstre), kiu sukcesis havigi al li la vidkapablon, d-ro Oliver Foot (la dua de dekstre), prezidanto de Orbis, kaj konsilanto s-ro Zhao Jinhui



interŝanĝo. Ili instruis al du mil kuracistoj la teknikon de grefto de korneo kaj arta kristalino kaj regustigan teknikon de strabismo kaj ambliopo. Ili faris operaciojn al 96 malsanuloj kaj donacis al la Shanxi-a Oftalmologia Hospitalo kuracajn ekipaĵojn. En la dek jaroj ĉ. 400 ĉinoj reakiris vidadon dank' al la operacio en la aviadilo kaj 3 000 ĉinaj kuracistoj kaj flegistinoj estis trejnataj.

La aktivecoj de Orbis en Ĉinio estis bone komprenataj kaj subtenataj de la registaro, popolaj organizoj kaj individuoj de Ĉinio. La ŝtataj gvidantoj intervidiĝis kun la membroj de Orbis kaj laŭdis ilian signifoplenan laboron. Precipe menciinde estas, ke ĉ. 30% de la blinduloj en Ĉinio atendas operacion de kornea grefto por reakiri vidadon, sed nur 3 000 ho-

moj promesis oferi korneon post la morto. Por respondi la alvokon de Orbis kaj admoni la popolon oferi korneon iuj el la ŝtataj kaj provincaj gvidantoj jam subskribis, ke ili oferos siajn korneojn post sia morto. La ĉinaj ĵurnaloj kaj gazetoj raportis pri la laboro de Orbis. La famaj pentristoj Dong Shouping (Dong Ŝouping), Li Keran, Zhu Qizhan (Ĝu Ĉiĝan) kaj Cheng Shifa (Ĉeng Ŝifa) dediĉis siajn verkojn por monhelpi Orbis. Tio estas precedenco de mondonaco de artistoj al Orbis.

En aŭgusto 1989 Orbis kaj la Higiena Ministerio de Ĉinio subskribis interkonsenton pri longtempa kunlaboro, ke ekde 1990 Orbis sendos tri kuracistajn grupojn al Ĉinio por trejni ĉinajn kuracistojn kaj flegistinojn. Krome, Orbis ricevis permeson viziti 400

urbojn en Ĉinio. Nun Orbis kolektas monon kaj ekipaĵojn por starigi sian unuan surteran oftalmologian centron kaj okulobankon en Taiyuan, la kvinan post tiuj en Kantono, Pekino, Ŝanhajo kaj Changsha.

Oni povas diri, ke la Orbis Fluga Oftalmologia Hospitalo estas hospitalo, kiu havas la plej vastan agadkampon en la mondo. Tial ĝia elspezo estas tre granda. Krome ĝi estas senprofita organizo, do ĝi bezonas monhelpon. Tio estas nobla afero, kaj ĉiuj bonkoraj homoj volonte helpas ĝin. Antaŭ nelonge iu filantropo donis al Orbis grandan sumon da mono, per kiu la lasta aĉetis pli grandan kaj pli modernan aviadilon DC-10. Per tiu aviadilo Orbis flugos al pli malproksimaj anguloj de la mondo. ■

(Daŭrigo de p. 26)

kiuj veturis partopreni en la kongreso. Dum la kongreso mi intervjuis la svedajn geedzojn Puff, ĉinan esperantiston Guo Yuejin kaj lian edzinon, kiuj konatiĝis kun mi en la 71-a UK kaj geedziĝis antaŭ 2 jaroj. Mi renkontiĝis ankaŭ kun japanaj esperantistoj-geedzoj, inter kiuj troviĝis mia malnova amikino Takeuti Tomiko kaj ŝia edzo. Mi ne precize kalkulis la nombron de la esperantaj familioj partoprenantaj en la kongreso. Tamen el la adresaro de la kongresa libro oni povas facile trovi multe da esperantaj familioj.

## KAMPARANO- ESPERANTISTO

Kamparanoj, kiuj lernas Esperanton, estas sufiĉe malmultaj en Ĉinio. Wu Tianxi el Shanxi-provinco eble estis unusola kamparano-esperantisto el la ĉinaj kongresanoj. En la oratora konkurso de la 2-a Ĉina Kongreso de Esperanto, okazinta januare ĉi-jare, li gajnis la 3-an premion. Pri tio li famiĝis en sia hejmloko. Li kaj lia edzino kulturis malpli ol duonhek-

taron da agro. Li opinias, ke ankaŭ kamparanoj devas kontaktiĝi kun alilandanoj.

## SPECIALA ESPERANTO-ELSENDO

Por ke la kongresanoj ĝustatempe informiĝu pri la kongreso kaj gravaj eventoj en kaj ekster Ĉinio, la Radio Pekino kaj Popola Radio de Qingdao kune faris specialan Esperanto-elsendon dum la kongresa semajno. La elsendo okazis dufoje ĉiutage, po 5 minutoj unufoje. La Popola Radio de Qingdao elsendis ankaŭ La Esperon kiel semajnan kanton, kio disvastigis la influon de Esperanto en Qingdao.

## MULTSPECIAJ ESPERANTAĴOJ

En la 2-a etaĝo de la hotelo Huanghai oni aranĝis esperantaĵan ekspozicion, en kiu oni vendis kovertojn, insignojn, monerojn kaj aliajn memoraĵojn, kiaj brakhorloĝo, kultura ĉemizo kaj pajla ĉapelo. Ili estis faritaj de la kongreso kaj diverslokaj Esperantaj organizaĵoj. Tie ĉiutage svarmis kongresanoj, kaj tiuj memoraĵoj havis

grandan debiton.

## MAGIA TRADICIA ĈINA MEDICINO

Pli-ol-80-jara hispana esperantistino Maria Vila Mas suferis de kronika genualgio kaj estis plurfoje kuracita en sia lando, sed vane. En la kongreso, dank' al la termoakupunktura kuracado far kuracisto Yu el la akupunkturista kaj masaĝista grupo de la Ĉina kaj Okcidenta Medicinoj de la Qingdao-a Hospitalo, ĉesis ŝia doloro kaj ŝi povis facile iri. Ŝi emociis nomis kuraciston Yu sia filo kaj invitis lin gastigi ĉe ŝi 2 semajnojn.

## MINIATURA UK


Kompare kun la antaŭaj pacifikaj kongresoj, estis granda ne nur la nombro de la kongresanoj, sed ankaŭ tiu de programeroj. Ekz., matena ekzerco tajĝiĉĵuan-o, kantadanca vespero, rapida kurso de la ĉina lingvo, duontaga kaj tuttaga ekskursoj kaj Arta Lanterna Festivalo de Qingdao, sume pli ol 30 eroj. S-ro Takaŝi Agou el Japanio nomis la kongreson miniatura UK. ■

# Domoj el tritikaj tigoj


Fotoj de YAN JIN

Tritiko estas ĉefa grenplanto en norda Ĉinio. Ĉiujare granda kvanto da tritikaj tigoj estas uzataj kiel furaĝo aŭ brulaĵo. Kampanoj de la vilaĝo Lijaying (Liĝajing) en la gubernio Gaomi, Shandong-provinco de Ĉinio, plektas belajn dometojn el purigitaj kaj ordigitaj tritikaj tigoj. Kiel popolaj artaĵoj, la kolorigitaj domoj multe ĝuigas la rigardantojn.

Etaj tritiktigaj domoj vendiĝas ne nur en magazenoj de ĉinaj turismaj memoraĵoj, sed ankaŭ en Usono, Nederlando, Svisio, Kanado kaj aliaj 30 landoj kaj regionoj, kun totala jara vendovaloro de 3.8 milionoj da juanoj. Tritiktigaj domoj riĉigis la kampanojn de la vilaĝo kaj la kampanoj de la najbaraj vilaĝoj sekvas ilian ekzemplon. Kaj tiaj artaĵoj fariĝas ĉiam pli delikataj. Ili estas diversformaj kaj belaj, kaj krome, ilia tegmento estas malfermebla. Kiel skatoloj por juveloj, ili estas ŝatataj de pli kaj pli multaj homoj.



Altaro de Riĉa Rikolto



La Sidneja Operejo

Tritiktigaj domoj





# Pri vojaĝo en la antaŭurbo de Dalian

**K**IEL raportisto de multaj jaroj, mi vizitis multajn vilaĝojn en la ĉina kamparo, kaj ankaŭ multajn vilaĝajn entreprenojn. Tamen, mi ekhavis tute novan senton, kiam mi venis al la vilaĝoj Xinzhaizi (Ŝingajzi) kaj Hongqi (Hongĉji) de Dalian, malfermita marborda urbo en nordorienta Ĉinio. Tie mi intervjuis s-ron Lu Chibiao de la Vilaĝa Industria Buroo de Ganjingzi de Dalian. Mi esperas komuniki tiun mian senton al niaj legantoj per jena interparolo.

Raportisto: “En la sekva tago post mia alveno al Dalian, mi vizitis Xinzhaizi kaj Hongqi. Tie mi vidis vicon post vico da konstruaĵoj en neordnara stilo, kiuj kaŝiĝas inter verdaj arboj kaj freŝaj floroj, kaj stratojn, kiuj interligas la konstruaĵojn. Funkcias tie diversaj publikaj instalaĵoj, kiaj poŝtofiĉejo, kinejo kaj magazeno. Kiaj do la vilaĝoj aspektis antaŭ la praktiko de la reformo kaj pordomalfermo en la kamparo?”

Lu: “Kiel en aliaj vilaĝoj ĉe grandaj urboj de Ĉinio, la kamparanoj de la du vilaĝoj prenis sur sin la taskon liveri ĉefe al urbanoj legomojn, fruktojn, akvoproduktaĵojn kaj brutoproduktaĵojn. Ili zorgeme kulturis kampojn dum multaj jaroj, tamen ili apenaŭ povis sin vivteni. Xinzhaizi havas sub si 8 naturajn vilaĝojn kun 24 000 loĝantoj. Ĝia totala jara produktovoloro de industrio kaj agrikulturo longatempe restis ĉe 23 milionoj da juanoj (5.5 juanoj egalas unu usonan dolaron), kaj la meznombra jarenspezo de la kamparano estis malpli ol 200 juanoj. Nun tute ŝanĝiĝis

la ununura administrado.”

Raportisto: “Cirkulas popoldiro: ‘Industrio kaj komerco riĉigas.’ Ĉu ankaŭ la du vilaĝoj iras tiun vojon?”

Lu: “Jes. De la reformo kaj pordomalfermo ili unue reordigis sian produktan strukturon. Ili anstataŭigis la ununuran administradon de agrikulturo per la kuna disvolvigo de plantado, bredado kaj servado, kun vilaĝa entrepreno kiel la ĉefaj. Ili funkciigis pli ol 300 vilaĝajn entreprenojn kun dekoj da fakoj, kiaj tiuj konstrumateriala, maŝina, metalurgia, kemiindustria, tekstila, mangaja, entenejiga, transporta kaj inĝenieria. En 1991 ilia totala industria kaj agrikultura produktovoloro estis 1.63 miliardoj da juanoj, ĉi-jare ĝi povos atingi 2.1 miliardojn da juanoj.”

Raportisto: “Ĝenerale, oni havas iujn miskomprenojn pri vilaĝaj entreprenoj. Antaŭ ol veni ĉi tien,

ankaŭ mi opiniis, ke vilaĝaj entreprenoj estas nur fabriketoj kaj havas nenian konkurpovon.”

Lu: “Kompreneble, en la komenco la produktopovo de la vilaĝaj entreprenoj estis malalta. Tamen post ia disvolvigo ilia fizionomio renoviĝis. Nun, aperis novaj tendencoj en la vilaĝaj entreprenoj. Unue, la du vilaĝoj faris kompletan kunlaboron kun grandaj kaj mezgrandaj entreprenoj, universitatoj kaj scienc-esploraj institutoj de Dalian, por pli racie uzi laborfortojn. Tio ne nur akcelis la disvolvigon de vilaĝaj entreprenoj, sed ankaŭ rapidigis la disvolvigon de la urba kaj kampara ekonomio. Due, tie nemalmultaj fabrikoj jam rompintis la malaltnivelan ripetadan produktadon kun malgranda skalo en la komenco de la reformo kaj organizis diversajn entreprenajn blokojn. Eĉ iuj grandaj ŝtataj fabrikoj aliĝis al bloko kun vilaĝaj entreprenoj kiel la ĉefaj. Trie, la

Turisma hotelo en la Verdmaro Montovilaĝo de Hongqi





En la lagra fabriko de Hongqi



En klasĉambro de elementa lernejo en Xinzhai

du vilaĝegoj pene perfektigas sian investan medion, starigis 20 entreprenojn investitajn de alilandaj komercistoj kaj ekipitajn plejparte sur la internacia nivelo de la 80-aj jaroj. Multaj produktaĵoj de la entreprenoj estas elektitaj kiel bonkvalitaj produktaĵoj. La konkurpovo de la vilaĝaj entreprenoj iom post iom grandiĝis.”

Raportisto: “Mi aŭdis, ke post sia riĉiĝo iuj kamparanoj ne scias kiel uzi la monon, ili do konstruas altklasajn domojn kaj luksajn tombejojn. Ĉu tion faras ankaŭ la ĉitieaj kamparanoj?”

Lu: “Post la riĉiĝo la du vilaĝegoj engaĝis nemalmultajn sciencistojn kaj teknikistojn, inter kiuj estis profesoroj, vicprofesoroj, diplomitoj el altlernejo kaj esplorstudentoj. Iliaj laborfruktoj kaj patentajoj jam enradikiĝis en la kamparo, radikale altigis la kvaliton de entreprenoj kaj pliiĝis la vigeleco de la vilaĝa industrio. Sekve, la tieaj kamparanoj aparte taksas sciojn. Riĉiĝinte, ili ne domaĝas monon por fari scienc-teknikan kaj

edukon aferojn. Xinzhai investis 2.1 milionojn da juanoj kaj konstruis multifunkcian scienc-teknikan domon kun areo de 1 400 kvadrataj metroj, kiu estas ejo por interŝanĝi kaj trejni talentulojn. Kun investo de 2.5 milionoj da juanoj Xinzhai starigis elementan kaj mezgradan lernejojn kaj aĉetis ekipaĵojn kaj aparatojn necesajn por instruado. 882 kamparanoj de Hongqi ricevis titolojn de faka kvalifikiteco elementa aŭ mezgrada. En ĝi formiĝis vicaro de sciencistoj kaj teknikistoj.”

Raportisto: “Mi aŭdis, ke ĉi tie iuj kamparanoj funkciigas fabrikojn kaj butikojn ĉe la loko, aliaj servas kiel direktoroj de translandaj korporacioj. Ĉu vere?”

Lu: “Jes. Kamparanoj povoscias terkulturi, tio estas senduba, sed ili administras kompaniojn, precipe faras negocadon eksterlande, tio ne estas facile kredebla. Fakte, la kamparanoj de la Ĝenerala Kompanio Hongda de Hongqi jam aĉetis la posedrajton de 60 hektaroj da agroj en Toronto de Kanado kaj

posedas akciojn de tri translandaj korporacioj, inkluzive de tiu por bredejo de cent mil kokoj.”

Raportisto: “La novaĵoj estas ĝojigaj. Sed kun la disvolviĝo de vilaĝaj entreprenoj, pli kaj pli mal-multiĝas kampoj, kio estas mal-trankviliga.”

Lu: “Jes, tio vere estas problemo. La du vilaĝegoj klopodas por preni pli da objektoj de la limigitaj kampoj. Ekz. la kamparanoj de la vilaĝo Xiaoxinzhai de Xinzhai investis 500 000 juanojn kaj konstruis bazon de specialaj legomoj. Praktikante la politikon de alta produktado, bona kvalito kaj alta efiko, ili ĉiujare liveras al la urbo Dalian 10 000 tunojn da legomoj, 2 200 tunojn da bonkvalitaj fruktoj kaj grandan nombron da ovoj, kokaĵo kaj porkoviando. Ili ĉiujare eksportas 400 000 kg da bonkvalitaj pomoj Hongfushi al sudorienta Azio, Hongkong kaj Aomen. Vi kaj legantoj de EPC venu al ni kaj gustumu la frukton !”

Raportisto: “Dankon!” ■

## KORESPONDI DEZIRAS

**Tarifo: Du internaciaj respondokuponoj por kvin vortoj aŭ mallongigoj. Esp-organizo kaj niaj perantoj ĝuas 50% da rabato. La redakcio**

**ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.**

\*Huang Zhong, 20-j. studento, dez. kor. kun diverslandaj esperantistoj pri literaturo, foto, nacia moro, bk. kaj pm. Adr.: Huangzhai Cun, Xipo Guanqu, Dongli

Zhen, Haikang, Zhanjiang 524242, Guangdong, Ĉinio.

\*Liu Jian, 40-j. komercisto, dez. kor. Esperante, angle, japane, ĉine kaj ruse pri ĉiuj temoj. Adr.: She Jian Cun Ping Fang Nr. 172, Bantang Pu, Xiangtan 411102, Hunan, Ĉinio.

*Aktoj de Internacia Scienca Akademio Comenius* (Volumo 1), nove eldonita de la Ĉina Esperanto-Eldonejo, enhavas 15 artikolojn de 20 famaj sciencistoj de Britio, Francio, Germanio, Italio, Japanio, Danlando, Nederlando, Svedio, Hispanio, Rumanio, Kroatio, Litovio, Taĝikstano k.a. La artikoloj, dividitaj en partojn humanisman kaj matematika-natursciencan, koncernas historion, geografion, juron, estetikon, lingvistikon, pedagogion, topografion, informadikon, astronomion, geologion, arkeologion, matematikon, kemion, biologion, sempatologion, kibernetikon, litologion kaj aliajn fakojn. Inter ili troviĝas “La radikoj de ĉiuj sciencoj kaj artoj”, “La principo de leĝeco en la sovietia kaj jugoslavia juraj sistemoj”, “Lingvo-historia pritrakto super la nomoj de la kanariaj insuloj”, “Pri la Zamenhofa traduko de la Malnova Testamento”, “Kontribuo al la historia topografio de la Eŭfrata kaj Habura Valoj en la romana epoko”, “Geografiaj aspektoj de la evoluado de la itala popolo”, “Necerteco, diverseco kaj informadika statistiko”, “La toremo de Siu por abstraktaj nombroj de Lelong”, “Influo de vitaminoj el B-grupo al plimultiĝo de Lemna minor L.”, “Studoj pri mezurado kaj modeligo de la ĝeneraliga lernoprocezo por la fakdidaktiko de la sempatologio”, “Substanca konsisto de litosfero de Suda Tianŝano kaj Pamiro” k.c. La aŭtoroj estas ne nur eminentaj sciencistoj, sed ankaŭ elstaraj esperantistoj, inkluzive de iuj plej famaj, kiaj Ivo Lapenna, Juan Régulo Pérez, Gaston Waringhien, Paul Neergaard kaj Helmar Frank, el kiuj kelkaj jam forpasis. Eble oni povas diri, ke tiu libro nuntempe estas la plej enhavoriĉa scienca verkaro en Esperanto, kun plej altaj akademia valoro kaj lingva nivelo.

Tamen la aperigo de tiu scien-

LIU LING:

## Naskiĝo de scienca verkaro en Esperanto

ca libro travivis multajn malfacilojn. La Internacia Scienca Akademio Comenius havas nombron da eminentaj esperantistoj-sciencistoj. Ili verkis en Esperanto disertaciojn pri la plej freŝaj fruktoj el sia esplorado, kiujn prof. Paul Neergaard, prezidanto de la akademio, kolektis kaj redaktis por aperi en formo de libro. Sed la akademio ne havas monon por ĝin eldoni. Kiam Chen Yuan, ĉina lingvisto, prezidanto de la Ŝtata Komisiono pri Lingva Laboro de Ĉinio kaj fonda membro de la Akademio, venis en 1986 al San-Marino por ĉeesti kunsidon de la akademio kun li interkonsiliĝis prezidanto Neergaard por serĉi eblecon eldoni la verkaron en Ĉinio. Reveninte al Ĉinio, Chen Yuan proponis la taskon al la Ĉina Esperanto-Eldonejo. Ĉar la libro konsistanta el specialaj fakaj disertaĵoj ne povas esti vendata grandkvante, eĉ ĝia produktokosto ne povas esti kovrita. Tamen oni ne devas subtaksi ĝian sciencon valoron kaj ĝian profundan influon al Esperanto-movado. Por subteni aplikadon de Esperanto en sciencoj kaj teknikoj, la Ĉina Esperanto-Eldonejo decidis fari la ofertan kiel sian kontribuon al Esperanto-movado celebrante la centjaran jubileon de Esperanto. En 1987 la eldonejo dufoje ricevis manuskriptojn

kompletigitajn. Estas tre bedaŭrinde, ke en novembro 1987 forpasis prof. Neergaard, la prezidanto de la akademio kaj la redaktoro de tiu libro, kaj des pli, en la naskiĝtago de Zamenhof en la sama jaro, sekvis vicprezidanto prof. Ivo Lapenna, kiu venis al Danlando por ordigi la manuskriptojn postlasitajn de prof. Neergaard. Tio estis peza bato al la eldonado de tiu libro.

La de ili postlasitan taskon plenumis prof. Christer Kiselman, ĝenerala sekretario de Akademio Comenius. Li finis la redaktadon kaj donis al la eldonejo la mankantajn manuskriptojn profitante la okazon, kiam li flugis al Pekino aŭguste 1988 por partopreni en la 2-a Internacia Akademia Konferenco pri Scienco kaj Tekniko en Esperanto.

La aperigo de tiu libro estas sufiĉe peniga. Ĉar krom Esperanto estas enmetitaj ankaŭ aliaj lingvoj, inkluzive de preskaŭ nekoneblaj grekaj literoj kaj diversaj signoj en malsamaj tipoj kaj grandoj, troviĝas pluraj mapoj kaj statistikaj grafikaĵoj, kaj precipe la komplikaj matematikaj formuloj alportis grandegan malfacilon al la kompostado kaj korektado. Tiam nia presejo ankoraŭ ne bone posedis la ĵus importitan novan teknikon de komputila kompostado. Post multfoja korektado oni ankoraŭ ne povis ricevi la netan provaĵon. Fine la presejo preferis rezigni la kompostan pagon ol daŭrigi la laboron, kaj la libro preskaŭ pereis antaŭ sia naskiĝo. Sed la eldonejo, malgraŭ ĉia malfacilo, daŭre klopodis rezolute por efektiviĝi la aperigon de tiu grava scienca libro. La plej penigan laboron plenumis maljuna esperantisto Liao Zhigen (Ljaŭ Ĝigen). Li atenteme per tranĉileto levis tavolon de imprespapero kun presita teksto, faris tondadon kaj gluaĵon kaj pretigis korektitajn paĝojn unu post alia. Tiamaniere li faris entute pli ol 2 000 korek-

# Antaŭparolo por “Aktoj de Internacia Scienca Akademio Comenius”

**E**N la nuna tempo impete progresas la scienco kaj tekniko. Tio karakterizas la novan epokon per internaciaj kunlaboro, interŝanĝo kaj konkuro en la scienca kaj teknika kampo. Ili plivastiĝas ne nur en du aŭ pli multaj landoj, sed ankaŭ en la tuta mondo. Tio estas objekte postulata de la moderna socia produktado kaj scienc-teknika internaciigo mem.

Ĉiu lando, kiu esperas disvolvi sian ekonomion sur la nuna nivelo, klopodas por disvastigi la plej novajn sciencajn inventojn en produktado kaj pli frue kaj pli efike utiligi avangardajn atingojn akiritajn en la scienca kaj teknika sfero. Tio forte akcelas kontakton kaj interŝanĝon de scienco kaj tekniko en internaciaj rilatoj.

La scienc-teknika progreso postulas internaciajn interŝanĝon kaj kunlaboron ne nur en produktado, sed ankaŭ en esploro kaj disvolvo de scienco. Precipe en scienc-teknika revolucio aperas serio da internaciecaj sociaj kaj ekonomiaj problemoj, ekzemple

spaca esploro, ekspluatado de oceanaj riĉfontoj de la tuta terĝlobo, disvolvo de aviada kaj aliaj trafikaj rimedoj, protekto de ekologia medio, energio k.a. Ĉiuj tiuj problemoj bezonas efikan solvon en monda sfero.

Scienc-teknikaĵ kunlaboro kaj interŝanĝo ne nur estas grava paŝo por antaŭenpuŝi la ekonomian rilaton, sed ankaŭ favoras malstreĉiĝon kaj stabilecon de la internacia situacio, kaj forte influas firmigon kaj disvolvon de la amikeco inter diversaj landoj.

Kvankam estas gravaj la scienc-teknikaj kunlaboro kaj interŝanĝo kaj ofteĝaj la amikaj kontaktoj inter la popoloj, tamen, bedaŭrinde, ankoraŭ ekzistas lingva baro. Esperanto, kiel artefarita internacia helpa lingvo, jam malfermis vojon por forigi la baron por la homaro. Dum pli ol cent jaroj Esperanto jam estas posedita kaj uzita de milionoj da homoj tra la tuta mondo pro sia racia strukturo, simpleco kaj facileco. Se ĝi estos adoptita de la tuta mondo kaj akceptiĝos kiel laborlingvo de la Unuigintaj Nacioj kaj aliaj internaciaj organizoj,

kiom da homoj kaj financaj rimedoj ŝpariĝos kaj kiom facilos la internaciaj kunlaboro kaj kontakto!

La prospera perspektivo de Esperanto estas bazita sur la vasta uzado. Oni devas fari ĉiajn eblojn por ĝia uzado en scienco kaj tekniko, krom en politiko, literaturo kaj turismo. Mi aprobas la klopodojn faritajn de la Internacia Scienca Akademio Comenius. Ĝi havas la saman celon kiel tiu de la Akademio Internacia de la Sciencoj, San-Marino, la Sciencista-Teknikista Esperanto-Asocio sub la Ĉina Akademio de Sciencoj kaj aliaj organizoj, plejparte por tio, ke oni uzu Esperanton en scienc-teknika interŝanĝo. Tial mi sincere gratulas ĝin pro ĝia publikigo de la unua volumo de “Aktoj de Internacia Scienca Akademio Comenius”. Mi deziras, ke Esperanto estu pli vaste aplikata en diversaj scienc-teknikaj praktikoj.

**Zhou Guangzhao\***

-----  
\*Fama ĉina fizikisto kaj prezidanto de la Ĉina Akademio de Sciencoj.

tojn. Poste la presejo fotogravis la bezonatajn kliŝojn. Estas malfacile precize kalkuli la produktokoston pro la konsumitaj homforto kaj financa fonto. En julio 1991 Zou Guoxiang (Zou Gūoxiang), responsulo de la Ĉina

Esperanto-Eldonejo, ĉeestis la 76-an UK en Norvegio kaj tie donis al prof. Kiselman la netajn provaĵojn de la libro, por ke la aŭtoroj faru la lastan kontrolon. Prof. Kiselman tre ĝojis kaj esprimis dankon al la eldonejo kaj aparte al mi kaj sinjoro Zou

Guoxiang, kiuj faris gravan laboron por la aperigo de la libro. Dank' al la sesjara kuna klopodo de diverslandaj esperantistoj, finfine en la komenco de 1992 aperis antaŭ la legantoj tiu altnivela scienca verkaro en Esperanto. ■

## AMUZOJ

Sveda leganto sinjoro Lennart Persson sendis al nia rubriko "Amuzoj" sian krucvorto-enigmon verkitan de li. Li diris, ke se oni legas la unuajn vortojn de la 2-a, 4-a, 6-a kaj 8-a horizontalaj linioj, fininte la krucvorto-enigmon, oni trovas gratulan frazon al solvinto. Kiel redaktanto de la rubriko "Amuzoj", mi kore dankas sinjoron Lennart Persson kaj sincere petas pli multajn amikojn partopreni en nia aktivado.

Li Qiang


### Krucenigmo

#### Horizontale

- 1 Korporaciaj distingiloj
- 2 Gentilaĵon post sukceso
- 3 Literaturaĵan
- 4 Prep. - Loka komitato - Ritm
- 5 Suicido en Japanio
- 6 Sen ellasito - Svingis sin antaŭen
- 7 Kulturtera - Verba finaĵo
- 8 Sukcesinto
- 9 Ne trovis ion interesan - Pecoj
- 10 Luno

#### Vertikale

- 1 Kampa - Arbaro kun vulpoj (Rad)
  - 2 Fiŝret' - Preskaŭ ligo
  - 3 Trab' - Blekus kiel lupoj
  - 4 Estas Romo ĉefurbo - Flugmaŝina
  - 5 Ŝirmeje - Sufikso por profesio
  - 6 Homa - Flankon
  - 7 Dolĉa "konstruaĵo"
  - 8 Malinta - Femalo - Tegi per flava metalo
  - 9 Saltanta insekto - Suf. por partecipo
  - 10 Havis impreson - Ĉambro
- (Solve trovebla en la sekvanta numero)




## Abonu "El Popola Ĉinio"

Nun komenciĝas nova abonvarba kampanjo 1993 por "El Popola Ĉinio". EPC kun interesaj artikoloj kaj belaj bildoj raportas pri Ĉinio en diversaj flankoj kaj E-movado en kaj ekster Ĉinio. Tiu, kiu abonas aŭ reabonas EPC en la kampanjo (de 1992.10.01 ĝis 1993.02.28), ricevos kalendaron. La abonvarbantoj ricevos ĉinstila(j)n memoraĵo(j)n laŭ sia kontribuo en la varbado.

Sendu la abonilon al nia peranto en via lando aŭ rekte al ni: Esperanta Sekcio de Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio, P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio.

## ABONTARIFO DE EPC

Lando	Valuto	1 Jaro	Sendokosto	Totale
Aŭstralio	AUD	18.70	16.00	34.70
Aŭstrio	ATS	192	128	320
Belgio	BEF	575.00	375.00	950.00
Germanio	DEM	27.30	18.20	45.50
Britio	GBP	9.20	6.30	15.50
Finnlando	FIM	61.40	49.60	111.00
Francio	FRF	88.00	62.00	150.00
Italio	ITL	20200	13800	34000
Nederlando	NLG	27.50	23.50	51.00
Nov-Zelando	NZD	25.60	22.00	47.60
Svisio	CHF	23.00	16.50	39.50
Usono	USD	14.00	12.00	26.00
Kanado	CAD	16.80	14.40	31.20
Japanio	JPY			4140
Por aliaj landoj en Eŭropo:				
	USD	14.00	12.00	26.00
Por aliaj landoj en Azio, Afriko, Latin-Ameriko, Orient-Eŭropo kaj Komunumo de Sendependaj Ŝtatoj:				
	USD			14.40



Yang Liying (dekstre) kaj liaj kolegoj

# Por resanigi anus- malsanulojn

de LIU ZHIYONG kaj ZHANG GUANGYONG

**A**NUS-MALSANO estas ordinara malsano. Kvankam ĝi ne estas mortiga, tamen grave turmenta pro la akra doloro kaj nedirebla suferado.

Estas sensuferigaj metodoj kaj en la tradicia ĉina medicino kaj en la moderna okcidenta medicino, kiaj ĥirurgio, lasera terapio kaj skleriga terapio, tamen neniu el ili estas ideala.

Antaŭ nelonge ni informiĝis pri nova kuracmetodo pri anusa malsano, t.e. sistema holografia terapio kontraŭ hemoroidoj, kreita de doktoro Yang Liying (Jang Lijing) de la Popola Hospitalo de Linfen, Shanxi(Ŝanŝji)-provinco. Tiu terapio nomiĝas ankaŭ terapio Yang. Ĝi estas sukcesa kaj ŝatata pro tio, ke en la kuracado oni uzas medikamenton anstataŭ bisturion, tial ne okazas hemoragio, nek doloro, cikatriĝo kaj sekvaĵo. La terapio Yang sendube alportas feliĉon al la malsanuloj suferantaj anusan malsanon.

D-ro Yang naskiĝis ĉe la Flava Rivero en 1944. Li studis farmakologion kaj la ĉinan medicinon kaj post diplomigo komencis sin okupi pri anusa malsano. Post 20-jara esplorado li solvis plurajn malfacilajn problemojn en kuracado de anusmalsano kaj inventis 2 specojn da injektaĵoj por kuraci anusmalsanon. (En la tuta lando estas nur 3 specoj da tiaj injektaĵoj.) En

1983 li inventis alt-efikan, malmulte toksan kaj vaste uzeblan medicinajn "Holografia Injektaĵo kontraŭ Hemoroidoj". Sukcesinte en la ekspertizo de la Higiena Buroo de Shanxi-provinco pri scienc-teknikaj fruktoj kaj ilia produktado, la medikamento estas grandkvante fabrikata kaj nun ĝi estas unika oficiala medikamento por nekrozaĵ-terapio kontraŭ anusmalsano.

Iu juna instruisto estis forte turmentata de anusa fistulo multajn jarojn. Ekzameninte lian malsanon, doktoro Yang aplikis la holografian terapion kontraŭ liaj hemoroidoj. Tuj en tiu tago la instruisto povis bicikli hejmen kaj post 15 tagoj li komencis labori en la lernejo kaj post aliaj 10 tagoj li komplete resaniĝis. Kiam li venis al d-ro Yang por ekzameniĝi, oni simple ne povis trovi la lokon, kie estis la fistulo.

Solvinte la malfacilaĵon en kuracado de eksteraj hemoroidoj sen operacio, d-ro Yang komencis studi, kiel malaperigi la postoperacian doloron.

Pro netolerebla doloro pluraj pacientoj malpliigis la fojojn de fekado post operacio kaj ricevis varmon per pogutigado de glukozo, kio tamen kaŭzas karencon kaj prokrastas cikatriĝon de la vundo. Iuj operacioj devas esti farataj kelkfoje, kio alportas teruran doloron al la operaciitoj. Rigardante la turmentatajn malsanulojn, doktoro Yang konsciis la gravecon de sia devo. Li konsultis multajn materialojn kaj faris senombrajn provojn. En 8 jaroj li vi-

zitis multajn urbojn, petis helpon de pli ol 20 hospitaloj, farmaciaj fabrikoj kaj superaj lernejoj. En 1990 li finfine kreis novan efikodaŭran lokan anestezililon "Injektaĵo Mintong'er". Aplikinte ĝin en grandaj hospitaloj en Pekino, oni konis, ke ĝia sendoloriga efiko daŭras 2-10 tagojn. Post ekspertizado en la sama jaro la Higiena Ministerio de Ĉinio sankciis "Injektaĵon Mintong'er" kiel specialan medikamenton kontraŭ anusaj malsanoj.


La terapio Yang akiris konvinkan efikon en la klinika kuracado. Per ĝi oni sukcese kuracis hemoroidojn, fistulon, anusan kreviĝon, anusan mallarĝon, anusan jukon kaj aliajn anusajn malsanojn. Iu 79-jara malsanulino en la urbo Renqiu (Ĵenĉiŭ), Hebei-provinco, suferis hematofekadon kaj anusoptozon jam 50 jarojn. Ŝi estis kuracata per terapio Yang kaj resaniĝis post 20 tagoj. Iu 56-jara laboristo de Nord-Ĉinia Olekampo suferis perianusan absceson. Post ekzameno oni konstatis, ke lin turmentis alta komplika fistulo. Post kuracado en du semajnoj li ne plu sentis doloron, la fistulo fermiĝis, la haŭto glatiĝis kaj la sindromoj malaperis komplete.

Esplorante la anusajn malsanojn, d-ro Yang verkis medicinajn verkojn el centmiloj da ideogramoj kaj eldonis "Sisteman Holografian Terapion kontraŭ Hemoroidoj". La terapio Yang estas aplikata ne nur en multaj lokoj de Ĉinio, sed ankaŭ en Usono, Singapuro, Filipinoj kaj aliaj landoj. ■

# La tigrototemo de ji-oj

**E**N la periodo de la matriarka klano en la primitiva socio, pro la speciala ŝato de animaloj kaj vegetaloj oni prenis ian animalon aŭ vegetalon kiel sian kultitaĵon. Ili rigardis sian adoratan totemon kiel la signon de sia klano, eĉ kiel sian prapatron. Ankaŭ la tigrokulto de ji-oj en Yunnan-provinco de Ĉinio originas el tia antikva totemokulto.

La popola epopeo Meige de ji-oj diras, ke en la frua periodo de la mondokreado, la dio de l' ĉielo sendis siajn kvin filojn krei la ĉielon. Post la kreado ili atakis la ĉielon per fulmotondroj por kontroli ĝian firmecon, tiel ke krevis la ĉielo. El kio ripari ĝin? La dio opiniis, ke la plej furioza en la mondo estas tigo, tial li sendis siajn kvin filojn alkonduki tigron. Kiam ĝi estis subigita, ili uzis ĝiajn kvar krurostojn kiel subtenilojn de la ĉielo, tiel ke ĉi tiu staris stabile. Poste, ili uzis la kapon de la tigo kiel la kapon de l' ĉielo, voston kiel la voston de l' tero, nazon kiel la nazon de l'ĉielo, orelojn kiel la orelojn de l' ĉielo, maldekstran okulon kiel la sunon, dekstran okulon kiel la lunon, lipharojn kiel sunlumon, dentojn kiel stelojn, oleon kiel nubon, spirajojn kiel nebulon, koron kiel la koron de l' ĉielo kaj la kolekiston de l' tero, ventron kiel maron, sangon kiel marakvon, dikan inteston kiel riveron, maldikan inteston kiel rivereton, ripojn kiel vojojn, felon kiel terkruston, malmolajn harojn kiel arbaron, molajn Tigrototemo de ji-oj



harojn kiel herbon, subtilan lanon kiel plantidon..., kiuj ĉiuj formis la nunan mondon.

La nigratigra klano estas la antaŭuloj de la antikvaj ji-oj. Eĉ nun ĝi ankoraŭ karakterizas sin ĉefe per kultado de nigra tigo, t.e., ĝi prenas nigran tigron kiel sian totemon. En multaj lokoj ji-oj nomas tigron per *luo* kaj sian naciecon per *luoluo*, signifanta tigran nacion en la ji-a lingvo. Ili opinias, ke ili estas nacio de tigroj kaj ĉiujare festas la Tigran Feston, kiu komenciĝas de la oka de la unua monato laŭ la luna kalendaro, kiam oni bonvenigas la prapatrontigron, kaj finiĝas je la dekkvina de la sama monato, kiam oni adiaŭas la prapatron. Dum la festo la ji-oj kune dancas la tigran dancon, akompanate de la muzikilo *ŝeng-o* kaj kultas la prapatrontigron por peti feliĉon kaj forigi katastrofon. En la kultado ili prenas la kalabasan ĉerpilon kun pentrita tigrokapo kiel la simbolon de sia prapatro.

Multaj ji-oj opinias sin tigras homoj. En iuj vilaĝoj eĉ hodiaŭ ankoraŭ cirkulas la proverbo: "La homo mortinte fariĝas tigo, kaj la tigo mortinte fariĝas floro." El la familiaj nomoj de ji-oj ofte legiĝas *luo*, kio montras, ke ili estas posteuloj de la tigo. La viro nomas sin mem per *luoluopu-o* aŭ *luopu-o*, signifanta virtigron, kaj la virino — per *luoluomo*, signifanta tigrinon. Ji-oj de ĉiam aplikas kremacion, ĉar ili opinias, ke la mortinto denove fariĝas tigo post forbruligo de la kadavro.


Multaj montoj, riveroj kaj vilaĝoj en la lokoj de ji-oj portas la nomon tigo. La ji-oj opinias, ke ĉiuj lokoj, kie loĝas tigra nacio kaj tigras homoj, devas porti la nomon tigo.

La tigo estas titolita de ĉinoj kiel reĝo de bestoj, ĉar ĝi simbolas fortecon kaj majestecon. La tigo estis adorata de la antaŭuloj de ji-oj kiel primitiva totemo kaj transformiĝinto de bonaŭguro kaj feliĉo. Ĝi estas kultata de ji-oj kiel ilia prapatro, tial en la niĉoj de iuj ji-aj domoj estas kultata la prapatro en formo de tigo, sur la pordoj vidiĝas pendaĵo en formo de tigo por ekzorci spiritojn kaj demonojn, kaj sur la muroj pendas pentraĵo kun tigrototemo. Ĉe la vilaĝoj sidas ŝtona tigro-dio, kiun ji-oj nomas per *luoni-o*. Ili prenas ĝin kiel la plej supernaturan kaj plej noblan kaj opinias, ke ĝi povas ekzorci spiritojn kaj demonojn, forigi katastrofojn kaj alporti al ili feliĉon. Ili jam metis ĉian feliĉon sub la protekton de la tigro-dio. ■

# Antikva strateto en la prospera urbo

Teksto de ZHANG QINGZHEN

Fotoj de LI CHUNGENG



FOSHAN estas moderna prospera urbo en suda Ĉinio, kun industrioj tekstila, ceramika, elektronika kaj elektra-aparata kiel la ĉefaj. La etaĝdomoj staras en la urbo, kiu konsistas el kvartaloj de komerco, industrio, loĝo, amuzo k.a. Tamen, inter la etaĝdomoj iam videblas antikvaj stratetoj, kiuj montras la stilon de tiu urbo.

Antaŭ nelonge mi vizitis la antikvan strateton Donghuali. Ĝi kuŝas meze de la malnova urbo, kun longo de 153 metroj. Ĉe ĝiaj tre mallargaj enirejoj staras po unu arkado kun la surskribo Donghuali en la ĉina lingvo kaj la dato de la konstruiĝo (1843).

La strateto Donghuali antaŭe nomiĝis Yangwu-strateto pro tio, ke tie loĝis nur du riĉaj familioj Yang kaj Wu. Hodiaŭ en la strateto estas ankoraŭ iliaj temploj kaj kabinetoj. Poste, pro la malprosperiĝo la du familioj transdonis siajn loĝejojn al iu ĝenerala gubernatoro. Por ke la domoj en la strateto estu pli bonordaj, li multe riparigis ilin. Post ripetofa riparado en la postaj jaroj, la strateto Donghuali famiĝis en la urbo Foshan.

Trapasinte la malgrandan arkadon kaj irinte profunden laŭ la granita strateto larĝa je pli ol du metroj, mi vidis ĉe la antaŭa par-

Strateto




to de la strateto nur antikvajn domojn kun duklinaj tegmento interligitajn per gablo kun randmuro en formo de pottenilo ĉe la supro. Ĉe la posta parto lokigas domoj, preskaŭ ĉiu kun tri ĉambroj kaj du koridorpartoj, kaj vicigas ambaŭflanke de stratetoj etendiĝantaj vertikale al la strateto. Po kvar stratetoj etendiĝas vertikale al ambaŭ flankoj de la strateto Donghuali. Ili estas masonitaj el ŝtonoj kaj la muroj de la domoj el kaheloj tre bonordaj, kio ĉio karakterizas tipajn domojn konstruitajn antaŭ pli ol 100 jaroj en Foshan.

Ridado de infanoj altiris min. Laŭ la rido mi iris antaŭen al infanĝardeno kaj vidis, ke tie estas domo kun freŝaj skulptaĵoj sur la muroj. La infanoj staris en rondoj kaj sin amuzis per ludoj. Ilia ridado alportis vivecon al la kvieta strateto.

Tie ĉiun familion servas faldebla pordo, tra kiu oni povas vidi ne nur maljunulojn, kiuj ludas ŝakon aŭ maĝangon aŭ flegas florojn, sed ankaŭ meblojn en la ĉambroj. En salonoj de multaj domoj sendifekte konserviĝas malnovtipaj mebloj, antikvaj ekranoj k.a.

Mi vizitis la unuan familion de la strateto kaj ĝia maljuna mastrino Hu varme kondukis min en sian domon. Ĝi estas tradicia domo el tri ĉambroj kaj du koridorpartoj. La tri ĉambroj inkluzivas fakte du ĉambrojn kaj unu salonon inter ili. Sur la tegmento de la salono estas luko. Ĉe la ĉambroj estas koridoro, kies enirejo kondukas al la strato. La ĉambro rigardanta al la pordo servas kiel dormoĉambro, kaj la alia ĉambro kiel kuirejo. Supre de la pordo de la salono pendas longa palisandra tabulo kun skulptitaj floroj, birdoj kaj bestoj. En la salono, krom iuj vivbezonaĵoj, la aliaj estas malnovtipaj palisandraj mebloj.

“Ĉu vi ŝatas la lokon?” mi de-



Ornamento sur ekrano en ĉambro

mandis la maljunulinon.


“Jes, jam pli ol 30 jarojn mi loĝis ĉi tie, konas ĉion en Donghuali kaj harmonie vivas kun la najbaroj. La domo estas pura, kaj neniam atakas muŝoj kaj kuloj. Tage kvieto regas en la strateto, sed en altaj domaroj ne. Por mi estas oportune loĝi en unuetaĝa domo. Ne nur mi, sed eĉ aliaj maljunuloj en la strateto ĉiuj ne volas foriri de la loko kaj transloĝiĝi en nove konstruitajn etaĝdomojn.”

Mi vizitis alian kvinmembran familion, kiu loĝis en domo el kvar ĉambroj kaj du salonoj kun plankareo de pli ol cent kvadrataj metroj. La mastro Xu Guokang estis teknikisto de la Foshan-a Ceramikaĵa Fabriko. Li emeritiĝis antaŭ kelkaj jaroj kaj vivas nun kune kun siaj edzino, filo, bofilino kaj nepo. Li sciigis al mi, ke pro manko de loĝejo la domo estis dividita en multajn ĉambretojn, iam eĉ naŭ familioj loĝis tie. Poste, pluraj el ili transloĝiĝis. Nun restas nur unu familio. Li diris: “La junuloj plejparte ne volas loĝi en Donghuali pro tio, ke tie mankas moderna atmosfero. Ili preferas loĝi en altaj etaĝdomoj. Mia filo jam aĉetis apartamenton kaj post

nelonge la familio loĝos en la nova domo. Tiam restos ĉi tie nur mi kaj mia edzino. Ĉagrena por mi estos la malfacilaĵo en purigado, tamen ĉiaokaze mi ne foriros de la loko, kie mi loĝis pli ol 30 jarojn.” Kompreneble, en Donghuali estas liaj multaj ŝakludaj amikoj, kiuj ofte trinkas teon kaj babilas kune kun li. Sur balkono kun areo de kelkaj kvadrataj metroj metiĝas diversgrandaĵoj envazaj pejzaĝoj zorgataj de li dum multaj jaroj. Lia konigo ege interesis min.

Kompreneble, kun paso de la tempo nerimarkeble ŝanĝiĝis la antikva strateto. Ekzemple, en iuj domoj, krom kompleto da palisandraj mebloj kun skulptitaj drakoj kaj feniksoj, ĉinaj ideografiaĵoj kaj aliaj antikvaj artaĵoj, oni havigis ankaŭ luksajn sofojn, modajn ŝranketon kaj kompletigitan meblaron, tapetis la murojn kaj ekuzis pendantajn lampojn, por ne paroli pri fridujo, televidilo kaj magneto-fono.

La antikva strateto estas grava historia loko protektata de Foshan. Multaj en-kaj eksterlandaj turistoj venas ĝin viziti. Ankaŭ iuj televidilmaj grupoj kaj filmostudioj filmas tie. ■



Domoj ĉe la strateto Donghuali

Pasejo de la strateto Donghuali



En gastoĉambro






Gajaj infanoj en la strateto

### SCIENCO KAJ TEKNIKO

● La 14-an de aŭgusto 1992 la Ĉina Xichang-a Satelit-lanĉo sukcese lanĉis la telekomunikan sateliton "Aussat B-1", produktitan de Usono por Aŭstralio.

Laŭ la opinio de fakuloj el pli ol dek landoj kaj regionoj, kiaj Usono, Britio kaj Kanado,



"Aussat B-1" antaŭ lanĉo

post kiam Ĉinio interrompis la lanĉadon de la aŭstralia satelito pro perturbo de la raketo en la 22-a de marto, ĝi trovis la kaŭzon de la perturbo en mallonga tempo kaj alprenis serion da bonefikaj rimedoj por sukcesigi la lanĉon, tio plene montris, ke la lanĉa tekniko de Ĉinio perfektigas tagon post tago, kaj Ĉinio ludos pli kaj pli grandan rolon sur la internacia spaconaŭtika scenejo.

● Scienc-esplorantoj de la Genetika Instituto sub la Ĉina Akademio de Sciencoj kunigis homan kaj plantan genojn, kaj per tio unuafoje efektivigis en la mondo la aperon de arta interferiga geno sur planto. La apero de arta interferiga geno sur tabako far ili montras, ke tabako, reprezentanto de la Morto, eble fariĝos oficinala planto.

La arta interferiga elemento gardanta ĉelon kontraŭ viruso troveblas en sango. El 45 000 litroj da homa sango oni povas ekstrakti nur 0.4 gramon da tia elemento. Sed ĉiu gramo da rizaj histoj de transigita geno, ekspluatita de ĉinaj scienc-esplorantoj, entenas 512-2 400.8 internaciajn unuojn da tia elemento, kun forta kontraŭvirusa aktiveco. Eksperimento pruvis, ke ĝi bone gardas ĉelon de amnia fluidaĵo de la homo, kulturita ekster la korpo, kontraŭ la atako de


stomata viruso. La profito estas ege dezirata.

● Por kontinue kaj stabile disvolvi la esploron pri bazaj sciencoj en Ĉinio kaj por surgrimpigi la kulminon de mondaj sciencoj, la "grimpan planon" difinitan post ripetada diskuto de 45 specialistoj oni komencis praktiki julie en la lando.

La plano difinita de la ĉina registaro konsistas el sume 30 fakoj, inkluzive de matematiko, fiziko, astronomio, kemio, biologio, baza agronomio, baza medicino, topografio, teknologio kaj ankaŭ aplikaj sciencoj. Ĉiu fako ricevas milionon da juanoj por esplorado ĉiujare. Ĝi estas konsistiga parto de la esploro pri bazaj sciencoj en Ĉinio. Laŭ kalkulo, en 1995 la nombro de la esplor-temoj elektitaj de sciencistoj kaj subtenataj de la ŝtato atingos ĉ. 20 000.

### EKONOMIO

● La kvin grandiozaj ekologiaj projektoj de Ĉinio kun totala areo de 5 780 000 kvadrataj kilometroj, t.e. 60.2% de la totala teritorio de Ĉinio, estas ĉiuflanke plenumataj. Ili estas: La projektoj de kampoŝirma forsta sistemo en norda, nordorienta kaj nordokcidenta Ĉinio, kampoŝirma forsto en la meza kaj supra basenoj de Yangzi-rivero, marborda kampoŝirma forsto, kampoŝirma forsto sur ebenaĵo, kaj batalo kontraŭ sablo. Statistiko far la Forstokultura Ministerio de Ĉinio diras, ke jam konstruiĝis 24 000 000 hektaroj da kampoŝirmaj forstoj en la lando, kaj krome, plantiĝis ankaŭ granda areo da ĉarpentlignaj, ekonomiaj kaj brulaĵaj forstoj. Dank' al tio, pliboniĝis la ekologia medio de la lando.



Diverslandaj artistoj en la Dua Ĉina Internacia Popola Artofestivalo

## KULTURO

● De la 14-a ĝis la 17-a de aŭgusto ĉi-jare okazis la Dua Ĉina Internacia Popola Artofestivalo. Artistoj el 16 landoj ĝuigis al la ĉinaj spektantoj popolajn kantojn kaj dancojn kun forta nacia gusto. Tiuj kantoj kaj dancoj kun apartaj karakteroj esprimas tamen la komunan deziron, t.e., aspiron kaj amon al la vivo, amo, paco kaj amikeco. En la akompano de lignaj instrumentoj kvin paroj da geviroj en festa vesto gaje dancis italan dancon, kio vidigis la ĝenron de Sicilio. Dancistoj el Nordeŭropo prezentis per sia danco, kiel kamparanoj laboris sur kampo kaj en domo, kaj la spektantoj kvazaŭ estis en neĝoplana vilaĝo. Kantoj kaj dancoj de Afriko kaj suda Ameriko karakteriziĝis per simpleco, ardeco kaj vigleco, kanada danco, kiu prezentis la vivon de indianoj, kaj aŭstralia danco ĝuigis la ĉinajn spektantojn per diverseco de la homa kulturo.

## ARKEOLOGIO

● Ĉinaj arkeologoj lastatempe elfosis ĉe maro de Nansha-insularo kaj ĝiaj rifoj prem-striitajn pecetojn de argilaĵo, pecetojn de fajencaĵo, blua porcelanaĵo kaj blue desegnita porcelanaĵo, feran ankron kaj kuprajn monerojn. Tio atestas, ke jam en Qin- kaj Han-dinastioj (221 a.K.- 220 p.K.) loĝantoj de suda Ĉinio faris ekspluatadon sur tieaj insuloj, rifoj kaj plaĝoj. Tio atestas ankaŭ, ke antaŭ 2 000 jaroj ĉinoj trovis la insulojn kaj rifojn de Nansha kaj tie okupiĝis pri produktado.

## TURISMO

● La pilgrimado al la kvar famaj budhismaj montoj, grava speciala turisma aktivado de la Ĉina Turisma Jaro 1992, inaŭguriĝis la 23-an de aŭgusto en Wutai-monto de Shanxi, Ĉinio. Budhismo havas historion de pli ol 2 000 jaroj en Ĉinio kaj certan influon sur ĝiajn ideologion, kulturon, arton kaj popolajn morojn kaj kutimojn. Wutai-monto de Shanxi, Emei-monto de Sichuan, Jiuhuamonto de Anhui kaj Putuo-monto de Zhejiang estas grandiozaj kun belaj pejzaĝoj kaj riĉas je temploj, kiujn vizitas multaj pilgrimantoj, tial ili estas konataj kiel kvar famaj montoj de budhismo. Wutai-monto estas la unua el la kvar. Partoprenis en la inaŭguro 220 pilgrimantoj de 9 turismaj grupoj el Germanio, Belgio, Luksemburgio, Aŭstrio, Hindio, Japanio kaj Hongkongo. La monaĥoj de Wutai-monto okazigis solenan religian kunvenon, preĝis pri la monda paco kaj feliĉo al la gastoj

kaj prezentis dancon pri la tibeta budhismo.

● Kamparanoj de la urbeto Dalianwan de Dalian, malfermita marborda urbo en nordorienta Ĉinio, investis 42 000 000 juanojn (5.5 juanoj egalas unu usonan dolaron) kaj konstruis verdmaran montovilaĝon kun areo de 2 000 hektaroj. En tiu turisma regiono imponas la Palaco de Pilgrimado al la Okcidento konstruita laŭ la ĉina klasika romano "Pilgrimado al la Okcidento", Palaco de Ĉinaj Klasikaj Artoj, Akvario, ĉemaraj plaĝoj kaj gastejoj kun areo de 60 000 kvadrataj metroj.



Parto de la Verdmaro Montovilaĝo

## MALOFTAĴOJ

● Marte ĉi-jare miljara testudo kun pezo de 7.8 kg eksponiĝis en Tunxi de la urbo Huangshan, Anhui-provinco, kaj en majo aliaj du miljaraj testudoj estis eksponataj tie.

Unu el ili pezis 9.1 kg. kaj la alia — 6.5 kg., kun malsamaj strioj sur la dorsoj. Ili estis kaptitaj en Hengjiang-rivero.

● Antaŭ nelonge grupo da eŭropaj sciencistoj vojaĝis en la Tibeta Aŭtonoma Regiono de Ĉinio. Ili ege miris, kiam ili trovis, ke en la vilaĝo Dongzi neniu mortis en 50 jaroj depost 1942. Tie ne estas suferantoj de kormalsano, kancero kaj apopleksio, kaj la mortokvanto de infanetoj estas nulo. La loĝantaro de la vilaĝo kreskis de 680 al 6 224, la plej aĝa inter ili estas 142-jara, kaj tie 138 maljunuloj havas la aĝon de almenaŭ 130 jaroj.

Sciencistoj supozis, ke la ĉefa kialo de la longviveco eble kuŝas en senpolua medio, paceco inter homoj kaj manĝaĵo el fabaĵo, rizaĵo kaj fiŝo.

### NOVA DISPOZICIO DE MARHAVENOJ DE ĈINIO

Antaŭ nelonge en Ŝanhajo okazis la 5-a Simpozio pri Ĉirkaŭpacifikaj Havenoj. Ŝtatoficisto de la Ministerio de Trafiko de Ĉinio deklaris al la fakuloj el diversaj landoj, ke nova plano pri dispozicio de marhavenoj de Ĉinio estis ellaborita.

La ĝenerala plano de la dispozicio estas jene:

En la Nordoriento, meti la gravitan punkton sur la konstruo de la havenoj Dalian kaj Yingkou, malfermi novan havenon Dayaowan de Dalian, kaj samtempe konstrui la havenojn Dandong kaj Jinzhou, por havi la akvotransportan dispozicion kun Dalian kaj Yingkou kiel la centro kaj Dandong kaj Jinzhou kiel la aloj.

En norda Ĉinio, preni rekonstruon de la havenoj Qinhuangdao kaj Tianjin kiel ĉefan taskon, kaj samtempe konstrui la havenojn Santan kaj Huanghua, por plenumi la bezonon elporti karbon de Shanxi-provinco kaj transporti varojn de en- kaj eksterlanda komerco de norda Ĉinio.

En Shandong-provinco, la akcentita laboro estas konstruo de la havenoj Qingdao, Yantai kaj Shijiu, kaj samtempe rekonstrui mezajn kaj malgrandajn havenojn Longkou, Weihai kaj Penglai, por plenumi la bezonon transporti energion kaj pluapase malfermi la duoninsulon Shandong.

En la provincoj Jiangsu kaj Zhejiang kaj Ŝanhajo, konstrui ĉefe la havenojn Ŝanhajo, Lianyungang kaj Ningbo, kaj samtempe konstrui la havenojn Nantong, Zhangjiagang, Zhenjiang, Nankino kaj Wenzhou, por konformiĝi al la malfermo de Pudong de Ŝanhajo kaj disvolvi la internan kaj eksteran komercon de la landinterno.

En Fujian-provinco, konstrui ĉefe la havenojn Fuzhou kaj Xiamen, malfermi la profundakvan havenon de Meizhou-golfo, kaj samtempe konstrui Quanzhou kaj aliajn mez- kaj malgrandajn havenojn, por disvolvi la poreksportan ekonomion de la ĉemara regiono de la provinco kaj fari trafikon inter la ĉeftero kaj Taiwan.

En Guangdong kaj Guangxi, konstrui ĉefe la havenojn Kanton, Shenzhen, Shantou kaj Zhanjiang, precipe konstrui la profundakvan havenon de Dapeng-golfo de Shenzhen, kaj samtempe konstrui la mez- kaj malgrandajn havenojn Beihai, Fangcheng kaj Zhuhai, por sin adapti al la bezono de trafiko kaj transportado de la kompakta industria regiono de la ĉemara zono kaj Perlo-

delto kaj la poreksporta ekonomio.

Necesas rapidigi la konstruadon de la havenoj de Hainan-insulo. Oni devas konstrui ĉefe la havenojn Haikou, Yangpu, Basuo kaj Sanya, por disvolvi la ĉirkaŭinsulan industriajn zonojn kaj turisman aferon.

La haveno Ŝanhajo estas la plej granda de Ĉinio, kaj ankaŭ unu el la aparte grandaj en la mondo. Oni malfermos kaj ekspluatos Pudong de Ŝanhajo por disvolvi poreksportan ekonomion. La haveno estas konstruota en tute modernan mondurbon.

### AKVO KAJ KURACA KAJ PATOGENA

Kiam Meniere-sindromo atakas, la suferanto sentas kapturniĝon kaj vertiĝon. Do engutu en la orelojn iom da malvarma akvo el fridujo. Post kelkaj minutoj mildiĝas la sindromo. Tiam oni forigu la akvon el la oreloj kaj sekigu ilin. Oni povas ripeti la rimedon. Ju pli malvarma estas la akvo, des pli bona estas la efiko.

Somere, maljunuloj ne emas senti soifon kaj tial malmulte trinkas akvon. Tio kaŭzas sangan kondensiĝon kaj malhelpas sango-cirkulon, ke oni sentas kapturniĝon, vertiĝon kaj palpaciojn. Precipe, se maljunuloj suferantaj de hipertensio kaj cerba arteriosklerozo tre malmulte trinkas akvon, do facile aperos embolo en ilia sango. Pro nemoviĝemo, malrapida peristaltado de la intestoj kaj malmulta manĝado de legomoj, maljunuloj ofte suferas de konstipo. Se ili ankoraŭ ne trinkas akvon ĝustatempe, pli serioziĝos la konstipo.

En la pasintaj jaroj japanaj fakuloj denove esploris super trinko de taso da malvarma bolinta akvo en mateno. Laŭ ilia opinio, se oni trinkas akvon tuj post ellitiĝo en mateno, ĝi povas esti rapide sorbita de sango kaj maldensigi ĝin. Tio signifas purigi ĉiujn organojn interne de la korpo. Rezulte, plifortiĝas la kapablo de la hepato por senvenenigi kaj tiu de la renoj por ekskrementi kaj intensiĝas metabolo kaj imuneco de la korpo. Ĉio ĉi tio estas utila por preventi malsanojn.

Tamen, kiuj suferas de kormalsano, hipertensio, renito, hepat-sklerozo kaj stomaka malsano, ne devas multe trinki en unu fojo. Se kormalsanulo multe trinkas akvon en unu fojo, tio pli ŝarĝos la koron kaj eventuale kaŭzos korastenion kaj infarkton de miokardio. Se hipertensiulo faras tion, do, eventuale, subite ekleviĝos sangopremo kaj eĉ okazos cerba hemoragio mortiga.

# Sanktejo en la historio de la rilatoj inter tibetanoj kaj hanoj

Teksto de WANG XIAN

Fotoj de ZHENG YUNFENG

**Z**HALING (Ĝaling) kaj Eling estas la plej grandaj lagoj en la supra baseno de la Flava Rivero. Oni karese nomas ilin Ĝemelaj Lagoj. En la antikveco ili portis la nomon Bohailago (Cipresaj Lagoj), ĉar siatempe tie ĉielskrapis densaj cipresoj. Ĝi nomiĝas ankaŭ tibeta maro. De tio vidiĝas, kiel vasta ĝi estas.

La dolĉakvaj lagoj famas ne nur pro siaj naturaj kaj geografiaj kondiĉoj, sed ankaŭ pro tio, ke en 641 p.K. la tibeta reganto Sunzamkampo bonvenigis tie principon Wencheng de Tang-dinastio, kiu estis edzinigota al li. Lige kun tio, la loko fariĝis en la historio sanktejo de la rilatoj inter tibetanoj kaj hanoj.

## RAKONTOJ PRI LA CIPRESAJ LAGOJ

Forlasinte la gubernion Mado,

ni veturis kontraŭ la fluo de la Flava Rivero al la loko, kie unuafoje renkontiĝis suvereno Sunzamkampo kaj principo Wencheng. Ni jam alproksimiĝis al la lulilo de la rivero.

La gubernio Mado estas maldense loĝata, kun malpli ol unu homo averaĝe por ĉiu kvadrata kilometro. Nia aŭto pene balanciĝis sur malglata tero. La gubernio estas 4 300 m. super la marnivelo kaj oksigeno en la aero egalas al nur 60% de tiu de la ebenaĵo, ke pli kaj pli fortiĝis la altituda reakcio de homo kaj aŭto, tamen tute ne timis altitudon senvestaj okotonoj (*Ochotona thibetana*), kiuj jen kaj jen saltadis antaŭ nia aŭto, kaj marmotoj, kiuj mire rigardis al ni sur deklivo apud la vojo kun antaŭaj kruroj levitaj kvazaŭ riverencantaj. Ii, kun pufiĝintaj ventroj, aspektis karnodikaj. La bestoj estas herbovoraj. Laŭ kalkulo, la

kvanto de herboj formangitaj de 20 marmotoj egalas al tiu de unu ŝafo en la sama tempo. Survoje ni vidis sennombrajn okotonojn kaj marmotojn kaj la kampojn grave detruitajn de ili.


Veturinte 50 km, ni alvenis Eling-lagon bluan kaj vastan kiel maro.

Ni starigis du tendojn proksime de la lago kaj hastis al ĝi. Tra la klara akvo de la lago videblis ŝtonpecoj kaj sableroj. La akvo elegantis kiel sateno kaj ni eĉ domaĝis vadi en ĝi. 10 km pli okcidente, kuŝis ĝia fratino Zhaling-lago.

De antikve cirkulas rakontoj pri ambaŭ lagoj. Historie la Flava Rivero multfoje inundis kaj breĉis digojn. Niaj antikvuloj opiniis, ke la dio de l' rivero alvenis la mondon. Sekve, de la 3-a jc. imperiestroj de multaj dinastioj sendis kulti la dion ĉe la lulilo de la Flava Rivero, ke rapide disaŭdiĝis la famo pri la lulilo kaj lagoj. Laŭ la "Nova Libro pri Tang-dinastio" verkita en 1060, antaŭ la entibetiĝo de principo Wencheng, t.e. en 635, konkerante tujhun-ojn, generalo Li Jing de Tang-dinastio rigardis la lulilon ĉe la lagoj. Kaj poste, en la libroj "Pri la Lulilo" kaj "Generalaĵo de la Rivero" oni detale priskribis la situon, grandcon, koloron kaj formon de la lagoj.

La blua Eling-lago havas formon de kukurbo kaj la lakta Zhaling-lago — formon de triangulo, kun areo iom pli malgranda ol tiu de la antaŭa. La diferenco de la niveloj de la akvosurfacoj de la

## Skemo de la antikva vojo Tangbo



du lagoj estas ĉ. 20 m kaj inter ili kuŝas la monto Bayanlangma. Okcidente de la monto estas Zhaling-lago kaj oriente de ĝi — Eling-lago.

Ĉe la lulilo ni faris aerfotografadon. Rigardante malsupren, ni vidis, ke la Flava Rivero komenciĝas de la monto Gezigeja norde de la monto Bayanhar, kaj traitante la imponan marĉejon Xingsuhai, fluas en la sinon de la lagoj. La Flava Rivero enfluas Zhaling-lagon per tri branĉoj kaj elfluas el la mezo de la suda bordo de la lago. Trafluite la kanjonon 20 km longan kaj 300 m larĝan, ĝi disfluas orienten per naŭ branĉoj al la sudokcidenta parto de Eling-lago. La Antikva Vojo al Tibeto prenis ĝuste la kanjonon kiel sian konsistigan parton. Niajn okulojn frapis aparta spektaklo, ke en la lagoj klare videblas griza rivervojo, kiu strikte interligas ambaŭ lagojn. Kiel naturaj akvorezervejoj, la lagoj reguligas la flukvanton de la Flava Rivero per si mem.

Ni surgrimpis la monton Bayanlangma. Okcidente de ĝi estas ruino de citadelo. Tibeta legendo diras, ke antikve tie estis la citadelo de la edzino de la tibeta heroo reĝo Gesar. Oriente de la monto sterniĝas verda herbejo punktita de diverskoloraj floroj. Ĝuste ĉe tiu poezia loko Sunzamkampo, reganto de Tibeto, bonvenigis principinon Wencheng antaŭ 1 300 jaroj. Estas notite en la "Malnova Libro de Tang-dinastio" verkita en 945: "Sunzamkampo kun siaj trupoj atingis la lagojn kaj bonvenigis la principinon ĉe la lulilo de la Flava Rivero." Tiam Sunzamkampo bofile salutis Li Daozong, princon de Tang-dinastio, kiu eskortis la principinon. Li okazigis solenan bonvenigan ceremonion por principino Wencheng kaj ties akompanantoj. Legendo diras, ke rajdante sur ĉevalo, Sunzamkampo akompanis la principinon en ŝia guado de la pejzaĝo de la lagoj. Ŝi loĝis tie pli ol monaton. Siatempe la lulilo servis kiel dividlinio inter tibetanoj kaj tujahun-oj. Tial, estas plene fidine, ke Sunzamkam-

po bonvenigis principinon Wencheng ĝuste tie ĉi. La monto Bayanlangma estas rigardata kiel atesto de la grava historia evento de la geedziĝa alianciĝo, tamen tie vidiĝas nenia signo rilate al la evento. Malgraŭ tio, tie ankoraŭ senteb-las la harmonia spirito de Sunzamkampo kaj Wencheng, videblas la solena spektaklo kaj aŭdiĝas ŝajne la ĉho de la muzikoj tang-dinastia kaj tibeta.

## GASTI ĈE TIBET-NACIANOJ

La unua nokto, kiun ni pasigis ĉe Eling-lago, estas ankoraŭ freŝa en nia memoro. En suna tagmezo ni atingis la bordon de la lago. Vespere la subiranta suno purpurigis la ĉielon. En la noktomezo subite leviĝis ventego kaj ektondris ondoj. Momenton poste, ekpluvis kvazaŭ la akvo estus verŝita per siteloj. Estis aŭgusta tago kaj mi devis porti plumveston kaj dormi sub plumlitkovrilo. Iom post la sepa matene, mi ellitiĝis kaj eliris el la tendo. Tiam mi rimarkis, ke la lago jam inundis la kampon kaj la akvo distancis de nia tendo je nur ĉ. 10 m. Mi senprokraste vekis miajn kamaradojn, ĉar alie la akvo englutos nin. Kiu povus imagi al si, ke la tiea vetero estas kaprica kiel petolema infano!


La ĉielo serenigis kaj ni denove direktis nin al la monto Bayanlangma. Tie estis malgranda vilaĝo kun dekkelkaj nigraj tendoj el lano de poefago. La loĝantoj estas tibet-

naciaj paŝtistoj. Proksime de ĉiu tendo laboris virinoj: iuj melkis ŝafojn, aliaj kolektis bovfekajojn kaj triaj ŝpinis fadenojn.

Nia vojevuidanto konigis nin al virino kolektanta bovfekajojn kaj demandis ŝin, ĉu ni povus viziti ŝian hejmon. Ŝi kun ĝojo konsentis pri tio kaj rapidigis la laboron. Ŝi plenigis la korbon sur la dorso per bovfekajo kaj portis ĝin en la tendon. Antaŭ ĝi ŝi miksis la bovfekajojn kaj faris ĝin diskaj platetoj, kaj metis ilin sur herbejon por sekigi. La sekigitaj fekplatoj servas al la paŝtistoj kiel brulaĵo. Kie vivas paŝtistoj, tie paŝtigas bovgregoj kaj troviĝas tia "brulaĵo".

La tendo larĝas ĉ. 10 m, kun oblonga terkameno en la mezo. Super la kameno estas fiksita luko, tra kiu enlasiĝas lumo kaj freŝa aero. Laŭ tibeta moro, viraj vizitantoj sidas dekstre de la kameno. Mi estis la plej aĝa el la gastoj kaj servis kiel estro de la vizitgrupo, tial oni sidigis min ĉe la plej varma loko en la mezo, kaj la mastrino kaj ŝiaj familianoj sidis maldekstre de la kameno. Ŝi de tempo al tempo hejtis la kamenon per bovfeka plato, kiu blue flamis kaj neniom malbonodoris. La mastrino regalis nin per buterteo kaj poste per jahurto kaj fine per budeno. Ĉe la momento ŝi eliris mortigi ŝafon. La tieaj paŝtistoj mortigas ŝafon ne per tranĉilo, sed sufokas ĝin permane. Poste oni kolektas sangon kaj haketas la viandon. Miksinte la hakitan viandon kun la sango, oni

Sur la kvieta Zhaling-lago







Zhaling-lago ĉe sunsubiro

plenigas intestojn per la miksaĵo. La mastrino kuiris la budenojn pli ol dek minutojn kaj elakvigis ilin. Ŝi regalas nin per la vaporantaj kolbasoj. Mi prenis budenon. Je ek-mordo, la sango elfluis sur mian manon kaj bonodoro tiklis mian nazon. La delikata budeno apenaŭ odoris malagrable. Nia voĵgvidanto diris al ni, ke oni ĝuas tiom bongustan budenon nur en paŝtista regiono, duonkuiritan, nutroriĉan kaj tonikan. Ni formangis ĉiujn budenojn en nur kelkaj minutoj. Subite mi ekpensis pri io kaj demandis, ĉu Sunzamkampo kaj Wencheng mangis tiel bongustajn budenojn ĉe sia renkontiĝo. La mastrino kompreneme respondis: "Jes, jes, certe!"

Ni adiaŭis la gastaman mastri-  
non, la monton Bayanlangma kaj  
la Ĝemelajn Lagojn kaj daŭrigis la  
vojaĝon al la vera lulilo de la Flava  
Rivero. ■

Familio ĉe lago






Fiŝkaptistoj ĉe Eling-lago

Marmotoj sur herbejo






Tibet-naciaj paŝtistoj sur altebenaĵo





## Inozitol-pulvoro kun marko Rongcheng



Adr.: Songhui Zhonglu 33, Songjiang, Ŝanhajo  
Telefono: 7820157  
Telefakso: 7820157  
Telegramo: 9197  
Poŝtkodo: 201600  
Fabrikestro: Jiang Linsong  
Vicfabrikestro: Ge Maochang

La Songjiang-a Grasa Kemi-industria Fabriko de Ŝanhajo produktas speciale inozitol-pulvoron. La pulvoro kun marko Rongcheng estas konata kiel bonkvalita eksportata produktaĵo de Ŝanhajo kaj fajna kemiaĵo de la Komerca Ministerio de Ĉinio. Ĝi vendiĝas en Usono, Germanio, Japanio kaj aliaj landoj kaj estas tre ŝatata de klientoj.

La pulvoro produktiĝas laŭ la kvalita normo difinita en la farmakopeo NF-12 de Usono. Ĝi estas ekstraktita el sengrasigita brano. La blanka kristala pulvoro estas iom dolĉa kaj ĝia enteno je inozitolo estas 98%. Kiel vitamino, ĝi estas uzata oficinale por redukti sangograson. Multfoja klinika praktiko pravas, ke la pulvoro bone kuracas hipersangograson, kardiovaskulajn malsanojn kaj hepatiton kaj mildigas diabeton. Longtempa prenado de tia pulvoro akcelas la metabolon, plifortigas la korpon kaj plilongigas la vivon.